

RAKONTOJ

& ESEOJ

el Cezario



RAKONTOJ de CEZAR

Araneo kaj Leibnitz

Ĉi tie parolas Edgar Wallace

Ĉu nur sonĝo?

Ĉu vi scias?

Dua Hitler

Hotelbluso

Klaus

La estonta magiisto

Miskvalita brando

Kvazaŭ revenus la malbono

Pri viro, kiu forgesis sin

Viro, kiu duobliĝis

Araneo kaj Leibnitz

Mi sidas kun mia tekokomputilo en nia verda pavilono kaj kopias tekstojn.

Jen subite marŝas araneo super la klavaron kaj poste plu sur la blankan tablon. Araneo kun tre longaj kruroj kaj dika kapo. Senhaste kaj netimeme.

Evidente ĝi ne sentas danĝeron. Tio ne estas en ordo. Kial ĝi ne timas, ke mi povus mortbati ĝin?

Leibnitz eraris. Ni ne vivas en la plej bona el ĉiuj eblaj mondoj. Kvankam la araneo tion evidente supozas.

Ĝoju, araneo, ke mia edzino ne proksimas. Ŝi mortbatus vin – nur pro timo.

Ĉi tie parolas Edgar Wallace

La telefono sonorilas, kaj dum la tre olda grafino manprenas la ricevilon, pikas la insida grafo orumitan tranĉilon en ŝian koron, kiu freneze batis malantaŭ ŝia mola kaj multe tro grasa mammo. Li ja koleris, ĉar li rajtigite timas pro la heredaĵo, kiu efektive sur ruze elpensitaj flankvojoj estis enironta en la manojn de certa Arthur Smith.

Sed la kolera kaj ofendita grafo bezonas la monon, ĉar li pasie pokeras kaj eĉ sen fortuno. La servisto kun la somnambula vizaĝo estas informita kaj portas la kadavron de la grafino en kofro al proksima tombejo.

La grafo, la murdinto, serĉas certajn dokumentojn, fine trovas ilin kaj tiam fumas dum longa pipon, kiu aspektas kiel markato. En matena kostumo li atendas la serviston, kiu revenas post du horoj kun gazeto kaj varmega teo, en kies tason la grafino, ankoraŭ vivinta, miksis mortigan venenon el Sumatra, ĉar certa sinjoro Smith insiste konsilis tion al ŝi, por ke ili estontece povu ĝui la plenan kaj puran feliĉon tute sen ĝenoj.

La grafo, trinkinta la teon, paliĝas, eligas blasfemojn, bluiĝas kaj tuj formortas. La servisto metas lin en duan kofron kaj portas la grafon al la sama tombejo, kie la dua elfosita tombo jam estas preta por la morta korpo de la grafo. Nur nigra ratogranda kato, kiu elsaltas el la tombo iom timigas la serviston. Ĝi volas elgrati liajn okulojn per grandaj ungoj, sed li senkapigas ĝin per ŝpato sen eĉ moveti per brovo.

Poste la servisto revenas en la domon, kie jam okazis du murdoj. Li surmetas diskon en la loĝoĉambro eksonas la kriminaltango. Li dancas lerte kelkajn baletpaŝojn kaj ĉe tio rigardas memgarde. Poste li tiras la maskon de la vizaĝo. Estas, kiel apenaŭ plu supozeblas alie, la tre honorata kaj tre respektinda sinjoro Smith, la servisto, kiu kontente rikanas.

Kaj denove sonorilas la telefono: „Ĉi tie Gloria-hotelo, la serviston mi petas!“ grumblas ina voĉo, kiu pro sia profunda baso iom memoras pri Zarah Leander.

„Estas ĉio en ordo“, mielas sinjoro Smith, „anĝeleto mia, dolĉa katinjo, mi tuj ekflugos aŭtomobile al vi, tuj!“

Li eliras el la domo kaj veturas haste en oldmobilo al la Gloria-hotelo, kie Eliza, la kokteleja damo kun la longaj gamboj jam delonge senpacience atendas lin. Ŝi paŭtas, ĉar li ankoraŭ ne venis. Tiu simio-idioto, eĉ ĝustatempe veni al rendezuo li ne povas, tiu ŝtipkapulo, ŝi pensas kolere.

Post alveno la atendato kisas Elinjon tiom triumfe, ke ĝentlemano kun ombrelo kaj melonĉapelo, ĝuste enveninta kaj facile rekonebla kiel la privata detektivo Eddy, komencas suspekti ion pri la stranga paro.

La detektivo „turnas“ siajn orelojn en la direkto al la bufedo kaj aŭskultas dum tio pri aferoj, pri kiuj li aŭskultu en neniu kazo ion, aferoj, kiuj donos post kelkaj pliaj komplikajoj je la la fino de la filmo al la kriminalinspektoro Blind la decidan frapbateton sur la cerbon, kiu havigos al *Scotland Yard* plian brilan venkon por justico kaj justeco.

Tio ja ankaŭ en la vera vivo povas okazi, sed nur, se oni ankoraŭ sankte kredas la modernajn fabelojn pri juĝistoj kaj policistoj kaj pri tro babilemaj prizondirektoroj kaj

aliaj bizaraj kriminalfiguroj.

Katinjo-anĝeleteo, Eliza, ne tute fidas al sinjoro Smith, ŝajne ŝi jam iel supozas, ke la senfidela kanajlo Smith ankaŭ ŝin ĉeokaze provos transmondigi per fia truko.

Sed la dubo nur en la fino de la lasta seria filmo montriĝos efektive tute pravigita, ĉar ĝuste en tiu tempo oni finis la produktadon de tiaj jam ekstermodaj filmoj, ĉar neniu plu volas pagi ion por ili. En la tv-programoj la filmoj komencis novan vivon, kio kondukis al tio, ke oni ankoraŭ nun povas rigardi ilin.

Ĉu nur sonĝo?

En unu el miaj sonĝoj ĉio estis ege komplika: Por povi fumi cigaredon, oni bezonis tutan gasfabrikon. Ununura paŝo estis tiel danĝera kiel marŝo tra la ĝangalo.

Se la homoj volis interkomuniki ĉe tablo, ili bezonis por tio specialan komputilreton kaj kodvortojn. Simpla veterraporto aŭdeblis nur, se oni estis enskribita membro en kotizdeviga veterraporta klubo.

En tiu aĉa sonĝo homoj kalkulis seninterrompe laŭ iuj tabeloj. La enspirado kaj elspirado de aero kostis monon pagendan laŭ mezuritaj kubikmetroj.

Ĉiuj nombris ĉiutage ian monon.

Papilioj startis sian flugon laŭ fiksitaj planoj en flughavenoj. Ĉiu kisetito estis kotizdeviga. La neglektado estis punata per laboro en la orminejoj.

Kiam mi vekiĝis, mi pensis, ke almenaŭ la vekiĝo ankoraŭ ne estas tiel komplika kiel mi timis.

Sed tiam mi ree fariĝis malcerta. La montriloj de l' horloĝoj moviĝis nur ege lante. Ĉe ĉiu spirtiro kurbiĝis la tuta universo.

Ĉu tio vere nur estas sonĝo? Ĉu mi vere jam vekigis? Iel mi ne povas decidi tion.

Ĉu vi scias?

Estis iam malgranda knabo en eta vilaĝo kun dudek domoj kaj gastejo. La knabo havis la nomon Erik. Kiel ĉiuj vilaĝaj knaboj li estis aventurulo, knabo, kiu nepre volis scii, kio tio estas, la mondo. Bunta ĝi estis kaj nekredeble bela. Sed ekzistis ankaŭ aferoj, kiuj ne estis en ordo.

Ekzemple tie estis la patro. Ĉar Erik ankoraŭ ne lernis per pseŭdosciencaj klarigoj vuali sociajn maljustaĵojn per densa nebulo, li simple nomis lin la malica patro. Tiu estis kiel juna viro, en la lastaj monatoj de la Dua Mondmilito, laŭdire ano de la fifamaj SS-trupoj de la Germana Regno. La avino vidis la tatuaĵon sur lia brako. Kaj la patrino de Erik eĉ asertis, ke li servis kiel skribisto en koncentrejo. Sed pri tio Erik kompreneble ankoraŭ sciis nenion.

La patro ĉiutage trinkis multajn bierojn kaj krome brandojn kaj verdajn mentlikvorojn. Do la patro drinkadis, kaj se li estis ebria, li tradraŝis la patrinon de Erik. Li draŝis ŝin tiel senrespekte kaj tiom forte, ke la

patrino ofte malesperiĝis, tiel ke ŝi konsideris la vivon puno kaj ofte eĉ plorsingulte larmis. Tiam la malgranda Erik ĉiufoje mankaregis ŝin kaj diris: „Nu, ne ploru, panjo, vi ja havas ankoraŭ min, mi estas ĉe vi. Ĉio ankoraŭ fariĝos bona, vi vidos, panjo.“

Kion alian fari? La patro estis ja kiel peza pluvoporta nuboj en la ĉielo, neforigebla. Se li ekfuriozis, tiam ne eblis retiriĝi, por tio la loĝejo estis tro malgranda. Tiajn fulmotondrojn oni devis elteni, tiukaze helpas nenio. La knabo povis fuĝi en alian domon, se li ankoraŭ ĝustatempe foriris, tion li povis fari, sed li ne povis forpeli la fulmotondron for de la patrino, tio ne eblis. De kie preni kiel knabeto tiom fortajn pugnojn?

Venis la tago, kiam la patrino de Erik tiom malesperiĝis, ke ŝi prenis hakilon por mortbati la patron. Sed kiam ŝi minacis lin per la hakilo, li nur ridis. Li ŝiris la hakilon el ŝia mano kaj ĵetis ĝin tra la fermita loĝoĉambra fenestro en la korton.

„Per hakilo oni hakas brulŝtupojn, serpento, sed oni ne dishakas homon per ĝi“, diris gaje la potenca neatakebla

patro. Estis ankaŭ por li mem neskribita leĝo, ke neniu kapablas venki lin.

Ne tre malproksime de tiu vilaĝo troviĝis alia vilaĝo. Kaj en tiu vivis la avino de Erik. La avino estis bonkora, ja ŝi estis pli ol tio. Ŝi estis sanktulino por Erik. Tiom ofte, kiom eblis, Erik vizitis la avinon kaj ĝuis tie mem karesojn de la avino, kiu dorlotis lin kvazaŭ li estus la propra infano.

Kiam iutage denove giganta ŝtormo traskuis la gepatran hejmon, Erik decidis forlasi ĝin por ĉiam. Plej prefere li estus kaŝinta sin ie, kie neniu povus trovi lin. Sed tio ne eblis. Por la plej proksima urbo li bezonus sepmejlajn botojn, sed tiujn li ja ne havis. Tial Erik decidis fuĝi al la amata avino.

Rapide li liris el la domo, kaj eĉ pli rapide for el la vilaĝo, kiu tute ne plaĉis al li. Li estis nervoza kaj timema kaj lia koro batis kiel martelo en lia brusto. Nur kiam li estis jam pli ol cent metrojn post la enirŝildo de la forlasita vilaĝo, Erik profunde elspiris. Estis somero kaj la ĉielo estis perfekte blua. Kelkaj nubosafaĵoj tie supre marŝis en la

sama direkto kiel li. Li rigardis tion kiel bonan antaŭsignon. Li ekjubilis kaj laŭte kantis iujn melodiojn, kiuj venis en lian kapon. Tiun pri la majskaraboj, pri tio, ke super la nuboj la libero devas esti senlima. Li imitis birdovoĉojn, kiel li lernis tion de la gajaj pepantoj mem. Hehe kaj hoho! Kiel belege estas la vivo! Haha kaj hoho! Erik trumpetis sian vivoĝojon en la mondon.

Dekstre kaj maldekstre de la vojo ondadis orflave la spikokampoj. Elegante riverencante la tigoj kliniĝis antaŭ Erik, kvazaŭ ili volus diri: „Ĉe Dio en la alto! Vi estas ja efektive kuraĝa bubo!“

Ja fulmo kaj tondro! Bela estas la vivo, tute eksterordinare bela. Erik kantis tiel laŭte kiel li povis. Se li ne kantis, li imagis la koleran vizaĝon de la patro. Sed li eĉ ne iomete timis lin. Neniam denove mi reiros, li pensis, neniam, malica patro, pri tio certu!

Erik iris fajfante, kuris, ĵetiĝis en la tritikon kaj ree iomete kuregis. Pli kaj pli li rapidis. Tie antaŭe videblis jam la pinto de la preĝejo. Tie antaŭe estis ja la avino, tie antaŭe estis ĉio, kio post li ne estis. Pli kaj pli grande elformiĝis

la tegmento de la preĝejo kaj el ĝi la preĝejo mem kaj laste la tuta vilaĝo. Ĉar estis la plej bela vilaĝo en la vasta pejzaĝo, kiun li povis imagi, li ankoraŭfoje haltis. Li ĝuis la vidaĵon per vaste malfermitaj okuloj. Ĉio estis tiom intima al li. Nur poste li kvazaŭ kiel moŝto eniris en la vilaĝon. Li, la reĝo de tiu vilaĝo! Li, la imperiestro de la mondo! Ĉu li ne efektive pravis? Ĉu ne vere la reganto de la mondo estas tiu, kiu kiel Erik ekmarŝas al pli bona vivo!?

La avino sciis kiel akcepti malgrandan reĝon, kiu almarŝis sen sceptro, sed kun multe da apetito! Ŝi tuj kunvokis pluajn gastojn, malgrandajn kaj grandajn, nudapiedajn kaj sandalportantajn. Ankaŭ la dombestoj ĝojis pri lia alveno. Eĉ la koko afable kokerikis sian saluton, kvankam ĝi ne alfajfeblas kiel hundo, kiel ĉiu scias. Mentoteo atendis la gravan gaston. La manĝotablo estis plena de bonaĵoj. Kaj Erik ne lasis nomi sin festfuŝulo! Li manĝis kiel triopo, tiel ke li baldaŭ havis la senton, ke li tuj krevos. Kiam la gastoj ĉiuj jam adiaŭis kaj foriris kaj li fine sidis sola kun la avino, ŝi diris al li: „Erik, estas jam tre malfrue, nun vi devas iri hejmen, ĉar alikaze la patro...

la patrino... nu, Erik, estu prudenta!“

Sed Erik eĉ ne pensis pri tio esti prudenta. La vorto efikis al li kiel ruĝa tuko al bovo en areno: „Kion? Reiri? Mi? Neniam! Ne al la malica patro. Li nur venu! Mi, Erik, restos ĉi tie! Tio estas mia firma decido!“ La avino ridetis rezignante kaj atendis, kio okazus.

Vesperigis kaj noktigis, sekvis tre bela tago, kaj denove vesperigis. Sed tiam alvenis la patro, la fulmotondro, la ŝtormo, la uragano. Li tiom furiozis, ke eĉ la kuraĝa avino ne provis kontraŭdiri ion. Gardante ŝi stariĝis antaŭ la knabo. Sed la patro fine kaptis la filon kaj tiris lin per elementa forto kun si. La knabo hirtiĝis kaj kriis. Obstine li provis rezisti. Sed la patro tiris lin brutale post si.

Post la forlaso de la vilaĝo li kaptis lin de malantaŭe sur la ŝultroj kaj puŝadis lin antaŭen. La fortika patro estis jam denove ebria, ĉar li trinkis gluton post gluto el brandoboteleto. Iom li ŝanceliĝis kiel granda arbo kaj kriaĉis: „Filo havu hejme sian lokon, perfidulo, hejme! Ĉu vi komprenas tion, friponeto, ĉu vi komprenas tion? Hejme, fiulo!“

Erik tremis je la tuta korpo, ĉar la patro estis ebria kaj tial des pli danĝera. Erik plorsingultis, pro malespero kaj honto. La malica patro trotis malantaŭ li. Pli kaj pli malheliĝis. La tritikotigoj ĉe la vojrandoj apenaŭ plu videblis. Eble ili ankaŭ nur kaŝiĝis, ĉar estis certe tro dolorige por ili devi vidi kiel malgranda reĝo inter kruelaj homoj devas suferi.

„Hejmen! Hejmen! Kanajlo! Mi rompos al vi la ostojn, kiam ni estos hejme, certu pri tio!“

Sub la feraj manoj de la patro la knabo devis iri kliniĝinte. Pri fuĝo eĉ ne estis penso en tiu momento.

„Hejmen! Hejmen! Fuĝinto!“

Sub maljuna kverko, kiu staris sola meze de la du vilaĝoj la fereca mano stopis la knabon. Kaj poste batis peza pugno ie el la malhelo sur lian vizaĝon. La knabo havis la senton, kvazaŭ granda ŝtono rompiĝus sur lia kapo. Por momento li vidis nenion plu. Li turnis sin lante flanken, por eviti plian baton. Kaj iom poste ekis fajna tintado en lia kapo, iel tiel, kvazaŭ iu en tre tre fora distanco tintigus

gracilajn sonoriletojn. Per unu fojo perdiĝis la doloro kaj granda kvieto disvastiĝis en li. Li ekvidis nun klare kristale flavajn steletojn, kiuj dancis tiel gaje antaŭ liaj okuloj, kavazaŭ ili volus okulumi al li mesaĝon:

„Malgranda Erik, ne estu malĝoja. Almenaŭ ni, la malgrandaj steletoj estas viaj amikoj. Ni forprenis la doloron de vi. Se denove iu batos vin, ni helpos al vi plian fojon. Kaj se iu kantos la kanton: „Ĉu vi scias, kiom da steletoj staras en la granda firmament'?, tiam vi ja nun scias, kiom da ili estas, tiam vi ne devos unue nombri ilin.“

*Kiom da steletoj staras,
kara, sur la firmament'?*
*Kiom da nubetoj faras
preterflugon en la vent'?*
*Ilin ĉiujn nombris Dio,
ke ne fine manku iu
en la granda tuta kvant'.*

Ili pravas, pensis la malgranda Erik. Malĝoje li rigardis al la vizaĝo de la patro, kiu rigardis lin mirigite. La malĝoja rigardo de la knabo per unu fojo sobriĝis lin. Konsternite

kaj plena de honto li konsciĝis subite, ke li ĝis nun ankoraŭ neniam serioze batis la filon.

„Kio estas, filo mia? Kial vi tiel strange rigardas min?“

„Patro, mi havas demandon al vi, ĉu vi scias, kiom da steletoj staras tie en la ĉielo, ĉu vi povus nombri ilin por mi?“

„Kial vi demandas tiel strange? Filo, kion vi havas? Kiel mi sciu tion? Ĉu ĉio estas en ordo je vi? Estas tro multaj, filo mia.“

Sed la filo respondis: „Ne, patro, estas nur malmultaj, tre malmultaj, mi ĝuste vidis ilin antaŭ mi, tiom proksime, kvazaŭ ili elsaltus el miaj okuloj.“

Ili rigardis sin reciproke dum momento kaj poste ili iris silente hejmen al la patrino, kiu jam plena de timo atendis ilin.

Rimarko: La verso estas el la germana kanto „Dio scias“, teksto: Wilhelm Hey (1816) Kanto, kiu ĉiam tre impresis min

pro sia tre humana mesaĝo. Mi ĉiam sentas min persone
alparolita, se mi aŭdas la kanton.

Dua Hitler

Estas ankoraŭ kelkaj minutoj ĝis la enlaso en la kinejon, sed ne multaj venis. La fundamentoj de la urbo ekstremas. Regas la militistoj. Perforto flirtas en la stratoj. De tempo al tempo oni aŭdas pafojn. Mortiga taĉmento rastas la urbokvartalojn. Kaj la tribuneno, sur kiu ankoraŭ hieraŭ parolis fanatika kolonelo, transformiĝis en tribunalon. La sama kolonelo nun tie mortkondamnas. Ankaŭ la homoj ekstremas. Komprenas nur malmultaj, kio okazis. La radioaparatoj krias: „Venko! Venko! Venko!“ Sed kiu venkis?

Neniu scias tion precize. La situacio ŝajne estas komplika.

Ankoraŭ hieraŭ oni laboris obeeme. Kaj hodiaŭ oni ĉesas la laboristojn, kvazaŭ ili estus bruto. Denuncantoj montrofingras perfide al kiu ajn. Oni trenas la montritojn sur la straton kaj mortpafas ilin.

Tankoj inundas la urbon. Ankaŭ ili pafas sen elekto al civiluloj. Ili rompas barojn kvazaŭ pajlostakojn. Besteca kruelo regas en la antaŭurboj. Kaptitoj marŝas en longaj vicoj akompanataj de bojantaj hundoj kaj kruelaj

soldatoj.

Neniu atendis tion. Tro subite venis la milito en la urbon.
Tro subite ĝi etendis siajn nigrajn ombrojn super ĝi.
Ankoraŭ hieraŭ senhontaj politikistoj superverŝis la
popolojn per ploroj pri paco. Pacon, ili diris emfaze.
Pacon. Eternan pacon. Miljaran pacon!

Kial nun subite la milito?

Estas strange, ke oni ne ordonis malpermeson eliran.
Eble tio ne necesas. La homoj rampas kiel vermoj en la
kelojn. Ili tie provas kaŝi sin. Sed kie sekure sin kaŝi, se
oni ne havas propran bunkron?

Antaŭ la kinejo pluvas senĉese. Ankaŭ tio estas surprizo.
La tago komenciĝis kiel promesite kun abunda
sunradiaro. De la malmultaj eniremoj kelkaj forlasas la
vestiblon eksteren. Ili do tamen ne eniros la kinejon.

Restas nur pensiulo kun lambastono, malĝoje aspektanta
amoparo kaj junulo vestita kiel usona soldato, sed kun tre
fortaj okulvitroj. Li ne aspektas malĝoja. Reva rideto
ludas sur lia vizaĝo. Li antaŭĝojas pro la filmo. En la frua

somero la filmo estis la granda sensacio en la urbo. Tiam oni interbatalis pro la biletoj. Eksterordinara filmo, tre reala, sed ankaŭ absurda. Tro malofte oni povas vidi ion tian, pensas la junulo. Nun li volas ĝui la grandiozan filmon je dua fojo. La filmo ludas en elpensita lando: La enhavo ŝoke frapas la atenton. Iom simile, kiel la situacio en la urbo, la junulo konstatas. Sed li ne tre afliktiĝas pri la okazaĵoj antaŭ la kinejo. Tio rapide pasos, io tia ĉiam rapide pasas, li pensas. Per fera mano ili kreos ordon. Kaj tio estas bona tiel. Kiu regu, se ne forta registaro? Ĉu eble iuj kaosuloj? Ne!

Li ne kontraŭas la militon, li rigardas tion tute senemocia. Li scias pri la milito. Por li la milito estas la daŭrigo de la politiko kun aliaj rimedoj. La milito solvas problemojn, laŭ li. Li studis militojn, precipe la Duan Mondomiliton. Li kolektis eĉ militstrategiajn librojn. Kaj li deĵoris libervole kiel suboficiro en la armeo. Tre volonte li estus servinta pli longe en la armeo, sed tion lia saneca stato malhelpis, nur pro tiuj damnitaj okuloj, li pensas malŝate. Senkonscie li rektigas la okulvitrojn kaj poste sian spinon. Rekteco estas por li ne nur vorto, sed

katraktera eco. Estas vere, ke oni mokas lin pro lia amo al uniformoj kaj al ĉio, kio havas rilaton al la milito. Ekde la lernejoj oni vokas lin: 'La dua Hitler'. Nu bone, se plaĉas al ili. Li scias tion pli bone. La milito ne preteratendindas, kiel tion imagas kelkaj pacifistoj. Tiu ne estas forigebla per pamfletoj. Idiotoj ili estas, ĉu ili jam iam atingis ion per sia kriado? Necesa la milito estas, jes ja, absolute necesa, kelkfoje oni bezonas purigan ŝtalan fulmotondron, ankaŭ kontraŭ tiuj perfiduloj de la patrio. Ili krias hipokrite pri paco kaj celas nur sian propran aĉan pacon, li supere pensas.

Ankoraŭ tri minutoj ĝis la enlaso. La lambastonulo studas la filmafiŝon. Kun malfermita buŝo li rigardas. Idioto plua, trovas la junulo. Ankaŭ la amparon li ne ŝatas, ne gapu tiel ŝafaj, naivuloj, li pensas malŝate. Li deturnas sin kaj forgesas pri la vestiblo.

Li sinkas en profundan revon. Li rememoras pri la filmo; jes ja, la filmo estas majstroverko. Rapide li glitas en la haŭton de la protagonisto. Nun li estas mem la protagonisto. Ha jes, ankaŭ en la filmo estas sieĝata urbo. Li, la fama protagonisto – unu el la sieĝantoj – portas

morte danĝerajn ledobotojn kun feraj najloj en la plandumoj. Li portas uniformon de leŭtenanto, kaj ŝtalkingon. Li havas la ordonpovon super tri soldatoj, kiuj akompanas lin. Lia mieno aspektas kiel ferbetono. Malestime inspektadas liaj aglaj okuloj. Pluvas ankaŭ en la filmo senĉese. Li kaj la soldatoj traserĉas kazernecan ludomon, sur kies ŝtuparo staras timoplenaj homoj kun levitaj manoj. Li ne longe babilaĉas, li puŝas teren virinon larmantan.

„Sur la teron, putino!“ li krias kaj tretas ŝin. Poste li ŝajnigas ekzekuton. Li komandas la domloĝantojn en la korton. Li lasas elserĉi ĉiun trian, starigas ilin antaŭ muro kaj tiam eksplode ridante krias: „Foriĝu, kanajloj, antaŭ ol mi pensos alie pri tio!“

La homoj forkuras. En la domo iu krias: „La antikristo! La antikristo!“ La taĉmento remarŝas en la domon kaj sturmas ĉiujn etaĝojn. Ili trovas neniun plu. En loĝejo, kie mankas aero, li, la leŭtenanto, per seĝo frakasas fenestron kaj rigardas eksteren sur la straton. Freŝa aero blovas en la ĉambron.

„Ha“, diras la leŭtenanto. Pluvas nun eĉ pli. Li vidas ombrelojn, kiuj aspektas kvazaŭ ili naĝus en la pluvo sur la trotuaro. Rekte sub la fenestro blankbarbulo diskutas kun laboristo en blua laborkostumo. Oni ne komprenas ion. Sed ŝajnas, ke ili mokas pri io. Ŝajnas, ke ili faras fiajn ŝercojn. Nun ili eĉ laŭte ridas. Ĉu eble pri la registaro? Tiuj kanajloj, li siblas malice kaj mallevas sian fusilon. La kruco de la cellinioj dancas sur la kapo de la barbulo. Li retiras la fingron ĝis antaŭ la ellasa punkto. Li ĉesas spiri. Li tiras plu. Knalas seke. La fusilkolbo puŝas kontraŭ sian ŝultron. La barbulo renversiĝas. Sango ekfluas sur lia frunto. La terurita laboristo rigardas instinkte al supre kaj tiras la grizulon al la dommuro. Li, la leŭtenanto ordonas persekuti la laboriston. Ili kuras malsupren sur la ŝtuparo. Tak, tak, tak. Ili atingas la straton. En fora distanco la laboristo formoviĝas. Haste ili celas en kaŭra pozicio. Ili ne trafas lin, kuras plu, pafas haste, kuras, pafas haste. Li observas ilin de supre. Fatrasuloj, malestime li rigardas siajn soldatojn.

„Kretenoj, bastardoj, varmduŝuloj“, li laŭte krias. Tion ili faras intence, tiuj hundidoj, li pensas. Li turnas la fusilon

al la fuĝanto, kiu nun estas nur nigra celtabulo en la horizonto. Li celas fridasange, tiras la fingron trans la ellasan punkton. Knalas kaj li trafis...

Sed tute neatendite ankoraŭfoje knalas, sed ĉifoje ne en sangavida vizio pri filmo. Ĉifoje bruas reale. Fusilkolboj trapike frakasas kun bruego la tri enirpordojn de la vestiblo. Vitropecoj disfluge dancadas sur la ŝakformaj marmorkvadratoj de la planko. Kaj poste kriaĉas kaj bojas voĉoj en la antaŭhalo. La kolonelo aperas, kaj tiam la mortiga taĉmento. Ili kaptas la amparon kaj tiras ĝin eksteren. Poste ili kaptas la lambastonulon. Tiu krias: „Dio mia, kion vi faras al mi, lasu min vivi, mi estas ja nur oldulo, mi servis mem kiel soldato, mi estis vundita ĉe Stalingrad! Fare de partizano! Ĉe la finbatalo en la domoj.“

Li havas larmojn en la okuloj. „Lasu min vivi, karaj soldatoj...“

„Tion povas diri ĉiu, kriplulo“, iu diras moke kaj ili trenas ankaŭ lin eksteren. De tie aŭdeblas seka pafo. Kiam ili revenis, la junulo ankoraŭ senkomprene miras pri ĉio. En

lia cerbo ĉasiĝas kontraŭdiraj pensoj kiel en tro rapida karuselo, ĝis fine iu alarmsireno per tranĉa resonado ekhurlas: Vivdanĝero!

Vivdanĝero! Vivdanĝero! Kiel mi klarigu mian simpation al ili? Kiel mi montru, ke mi estas unu el ili? La dua Hitler ne kapablas eĉ pensi pro teruro. Plena de malespero li ĵetiĝas pantere en la vitrotabulon de la enlasa pordo al la kineja interno. Kun la brakoj antaŭ siaj okuloj li preskaŭ falas en la displitiĝintajn vitropecojn. La kolonelo faras geston al li: „Mortpafu tiun cirkoklaŭnon! Ek do, nun faras NI la filmon!“

Svarmo da kugloj sekvas lin. Sed bonŝance por li ili ne trafas lin. Tak, tak, tak, tak, eksekvas la mortiga taĉmento. Sen iu klara celo la fuĝanto kuras en spektaklejon, kaj tiam sur la ruĝa tapiŝo el kokosfibroj laŭ la sidlokaj vicoj antaŭen al la blanka tolaĵa filmvando. Tie ekas nun subite la filmo. Kial? Kial? Kiun sencon tio havu? Li pensas. Tie antaŭe maldekstre, la fera pordo por la fuĝvojo, ha jes, tien mi devos fuĝi, li pensas fulmrapide.

Sur la larĝa filmvando flugas helikoptero super detruita

pejzaĝo el brulanta arbaro. Tiam ruinoj, fumo, ruinoj, fumo. Tankoj transveturas asfaltitan straton. Tiam la helikoptero surteriĝas sur la kraterigita areo de foirplaco. Fantoma urbo donas la tristan fonon por rapide starigita oratora tribuno el pina ligno. Oni salutas al la generalo, kiu pale eliras el la flugmaŝino. „Urĝas, urĝas“, li haste diras kaj grimpas sur la tribunon. Li metas fingropinton sur la mikrofonon kaj la megafonoj ekzumas. Li komencas paroli: „Soldatoj! En tiu ĉi malfacila horo ni devas firme kunsta...“ La reston forglutas la subita bruo de la eksplodanta helikoptero. Plia diskrevanta grenado balaas la generalon kiel ŝtofpupon de sur la tribuno.

La fuĝanta junulo atingas la finon de la irejo kaj la pordon apud la filmvando, la mortiga taĉmento post li. El laŭtparolilo sonas raŭka virinvoĉo: „Kiel, vi ne timas la militon?“

Kurinte tra la fera pordo, li krake fermas kaj riglas ĝin. Kugloj orelsurdige tamburas la pordon. Li nun vidas antaŭ si senfinan tunelan koridoron. Li hezitas iom, sed flankvojo ne estas, por povi fuĝi en alia direkto. Li hastas plu, post li oni marteladas la feran pordon. Ili eksplodigas

la pordon. Kaj tiam ili denove sekvas lin. La koridoro ŝajne ne havas finon, li pensas malesperiĝante. Ili venas pli proksimen, ili nun povus denove pafi al li. Sed ili ne faras. Ili proksimiĝas pli. Tak, tak, tak tak... La koro de la persekutato batas en freneze rapida ritmo. Ankoraŭ du metroj, tiam ili atingos lin, tak tak tak tak. Fora ridado el la laŭtparoliloj en la spektaklejo miksiĝas kun la hurlanta ridado de la persekutantoj. Tak tak, tiam iu faligas lin per sia dekstra piedo. Kiam li kuŝas, ili ekbatas lin, senkomplete ili batas kaj tretas lin. La malfeliĉulo ne provas rezisti. Kiel morte vundita kapreolo li rigardas malĝoje siajn murdistojn. Li sternas sin rezigne sur la betona planko. La murdistoj ne lasas de li. Kiel sangohundoj ili plu atakas. Denove kaj denove ili tretas lin. Obtuzigite li sentas kiel siaj dentoj elrompiĝas, li elsputas ilin por ne sufokiĝi. Unu el ili tretas en lian ventron, unufoje, dufoje, trifoje. Ekscitite ili tremas, estas ilia horo, estas la horo de perforto. Kiam li jam rigide kuŝas, unu el ili tretas lin per la fera pinto de ŝuo en la sangantan vizaĝon.

„Subhomo malpli en tiu bela nova mondo“, la kolonelo

kontente rimarkas. Kaj tiam li komandas: „Sampaŝe ekmarŝu!“ Kaj la mortiga taĉmento denove marŝas – por trovi pluajn viktimojn.

Hotelbluso

Mi pakis nervoze la kofrojn kaj malaperis. Sed kion mi diru? Estis kvazaŭ tiu damnita hotelo jam firmkroĉiĝis al miaj piedoj kaj en mia cerbo. Estis kvazaŭ inkubo. Io devigis min reveni tien. Ĉu estis la poetino, kiu tiel bele ludis la bluson per sia koncertgitaro? Ĉu estis nur la bluso?

Sed kiam mi revenis, ŝi evitis min denove. Ŝi sidis kun la idiotoj gaje je unu tablo kaj lasis adori sin kiel diino. Ĉu mi nur imagis, ke ŝi iom amas min aŭ iel tiel? La malĝoja vero estis tiu, ke ŝi malamamis min eble eĉ pli ol ĉiuj aliaj tie.

Mi pakis miajn kofrojn denove kaj malaperis senspure.

Sed kiam min poste ree kaptis la bluso, mi ne plu trovis la hotelon.

Ĉiu diris al mi, ke la hotelo neniam ekzistis. Estis vere strange. Kiom ajn mi serĉis ĝin, mi ĝin ne plu trovis.

Ĉiuj diris, ke ĝi ekzistas nur en mia imago. Mi ne scias, tio

fakte ne eblas, mi estis ja tie. Sed foje-foje mi dubas pri mia propra menso.

Sed tiam mi revidis la hotelon post jaroj subite denove sur albumkovro. Sur la frontbildo sidis la poetino kun nigra t-ĉemizo kaj bela nigra hararo. Ŝi estis ebria, kiel la aliaj ĉe la tablo. Du ĉerkoportistoj kun blankaj gantoj eniris la blushotelon, kun peza ĉerko, kiun ili pene portis enen.

Iu ulo diris poste al mi, ke la bluso estas kiel drogo. Oni neniam plu povus liberiĝi de ĝi, de la hotelbluso, de la obsedo pri la bluso entute. Kaj la frontbildo laŭ lia persona observo ne estis mensogata, ĝuste tiel okazis, asertis la ulo.

Ŝi nomiĝis Suzanne, li diris. Jes, efektive, estis Suzanne, ŝi mortis laŭdire je malgajeco iumatene en la babila rondo. Ŝi freneziĝis laŭ li, ŝi ankaŭ tial ne trovis la vojon plu eksteren, ĉar ŝi ĉiam serĉis la cambroŝlosilojn. Fine ŝi fariĝis tute konfuzita. Estis pollandino, li diris. Se oni povas fidi al ŝia pasporto.

Nu, kion mi diru pri tio? Damne, ŝi estis pollandino, laŭ ŝia aserto, aŭ tamen el Ruslando? Laŭ ŝia prononcado tio estis ebla.

Foje-foje mi pensas, ke tiu hotelo estas mia sorto.
Freneze, ĉu? Hotelo, kiu ne plu ekzistas, estu mia sorto?
Kaj tamen tiel estas, kiom ajn mi streĉas miajn fortojn por nei tion.

En miaj songoj la hotelo denove kaj denove aperas en morne blua nokto, krianta per neonreklamo:

B H V L B Ŝ
L O - A - A
U T I S O N
- E - T - C
S L' A A N O

Klaus

Ni estis tri junuloj, kiuj serĉas ie post la horizonto la ĝustan vojon. Tamara, Udo kaj mi mem, oni nomis min tiam Hagen Hirte. Ŝerce ili diris pri mi, ke mi estas iom simila al Hagen el Tronje. Certe nur pro tio, ĉar ni ĉiuj ĵus legis la Kanton de la Nibelungoj en prozo.

Ni sidas jam dum kvin minutoj triope ĉe la stratrando de bone flegata eta parko de iu urbeto. La domoj sur la alia stratflanko aspektas ĉiuj neoklasikismaj. Ili bezonus novan farbon, sed ili tamen plaĉas al ni, pro la morbida eleganteco, kiun ili prezentas.

Tamara montras al kiĉa orielo, kiu aspektas kiel tureto de burgfraŭlino, kaj ŝi diras: „Tie mi volus loĝi, for de vi ambaŭ, aĥ, tio estus bela!“ Ŝi diras tion, ĉar ni survoje jam plurajn fojojn mokis ŝin, pro pura plezuro. Sed Tamara trovas tion ne tiel plezuriga kiel ni. Ni prefere ne respondas, ĉar ni iel sentas, ke ŝi pravas pri sia kritiko kontraŭ ni.

Kompreneble ni ne serioze kverelas, tute male, estas ja dimanĉo, kaj ni volas ĝui tiun liberan, sunplenan, gajan

tagon. Ni trampis ĝis ĉi tien. Ni faras nur paŭzon kaj la efektiva celpersono estas konato, flegisto en hejmo, kiu loĝas en vilaĝo, proksime.

Neniu el ni pensas en la momento pri la laboro aŭ la universitato, des pli ni diskutas pri tio, ĉu la vizito ĉe la konato estos sukceso ĉu ne, ĉu li povos helpi al ni ĉu ne, ĉar Udo kaj mi volas forlasi la landon GDR, pri tio ni jam decidiĝis, unue ni volis eĉ fuĝi per padelboato trans la Baltan Maron, sed poste ni rezignis pri tio, ĉar la risko estus tro granda. Prefere legale forlasi la landon, ni havas ja tempon, sed kiel oni faras tion? Ni sciis nenion pri tio, kaj tial ni serĉis la respondojn ĉe homrajtaj grupoj, kiuj kunlaboras kun la evangelia eklezio. Estus danĝere demandi ilin per telefono. Tial ni trampis.

Tamara ankoraŭ volas fini la studadon. Ŝi ne tiom certas kiel ni, ĉu ŝi vere volas forlasi la landon. Ŝi nur ne volas perdi Udon, sed tion ŝi ne diras.

Ĉe la trampado diino Fortuno helpis nin ĝis nun. Ĉiam denove haltis aŭtoveturigistoj pro ni, kiuj ne volis „preterveturi sian junularon“. Mi devis pensi pri la bibliaj

birdoj el la montprediko en la evangelio de Mateo, kiuj ne semas kaj ne rikoltas, kaj kiujn Dio tamen nutras. Nu, ni ne posedas aŭton, sed tamen la kara Dio veturigas nin.

Certe, tute normalaj ni ne estas. Surstrate kaj en la aŭtoj ni bruas en fremda lingvo, kiun neniu krom ni komprenis: „Bonvolu eniri en la aŭto, sinjorojn!“ diris ekzemple Tamara.

Kaj mi por ekzemplo respondis: „Tamara, kial vi ne prenas la akuzativon, kara, tiu ne mordas vin, haha?!“

Kaj Udo ekzemple diris: „Tion ŝi neniam lernos, Hagen,“ kaj li rikantis larĝe.

Mi diris, donante ekzemplon, al Tamara: „Permesu, ke mi prezentu min al vi, sinjorino! Tiel oni devas diri tion, mia kara, nekredeble ke vi studas la amharan je la universitato, kaj tamen vi ne regas la akuzativon, hm?“ Ke Tamara poste tiom paŭtis, mi trovis iom troigita.

„Ĉu cigaredo de la marko „Karo“, konata kiel forte venena, agrablus, sinjorino!“ demandis ekzemple Udo surstrate.

Kaj ŝi ofendite respondis: „Kion signifas venena, he? Ha, mi komprenas nun! Vi jam denove fumis ĉiujn F6-cigaredojn, friponojn, kaj mi fumu la senfiltrajn, kvankam mi pagas la filtrocigaredojn.

„La filtrocigaredojn“, Udo respondis okulume.

Kaj tiel plu kaj plu kaj plu ...

Ke Tamara jam tiel bone parolis E-on, kvankam ŝi komencis lerni la lingvon nur antaŭ tri semajnoj, neniu el ni viroj koncedis, ja kial? Ni ja ankoraŭ ne legis la librojn de la feministino Alice Schwarzer, la plej bona amikino de ĉiuj inoj. Tio ne signifas, ke ni ne ŝatis la studentinon Tamara. Tiam ni lernis Esperanton sur la strato, dum ni marŝis, la dikfingron envente kaj la konversacilibron enmane.

Poste ni konversacias plu en la parko, sidante ĉe blankaj seĝoj kaj tabloj.

Niaj pensoj ŝvebas tiom malproksime de ĉiuj ĉiutagaĵoj, ke oni devas timi, ke ni tuj ekflugos ankaŭ korpe en la bluegan ĉielon. Tiaj entuziasmaj konversacioj povas esti

danĝeraj. Ni lulas nin en tre edifaj pensoj, karesataj de radianta suno, kiun gloris jam Francisko el Asisi. Ni manĝas nian ambrozion, kiu konsistas el profana rostita kolbaso kun freŝa terpomsalato.

Jen altrudiĝas problemeto. Ni ne scias, kie la vizitoto precize loĝas. Udo elprenas mapon, en kiu eĉ vilaĝoj kun ne pli ol tri domoj estas treoveblaj. Li diras ridete: „Havu konfidon, ĉio fariĝos bona!“ Do, neniu danĝero! Se eĉ la pedanta Udo diras tion, li certe pravas.

Tamara, Udo, kaj mi cerbumas, sed ne tro. Ni ja havas konfidon. Ĉe la serĉado de la loko ni eĉ iom ĉirkaŭrigardas. Niaj rigardoj vagas al la najbara tablo, ĉe kiu sidas juna kristano kun okulvitroj, kiujn jam la okulkuracisto Zamenhof, la iniciatoro de Esperanto uzis. La surreversa plaketo montras lian evangelian konfesion. La kristano, ruĝbarbulo, ŝvitas en la vizaĝo. Li rigardas senesprime preter nin. Li sidas senmove kaj apenaŭ atentis nin. Apud li ridetas al ni rulseĝisto, kies manoj strange kurbiĝas super la tablon. Kun granda peno li ĉiufoje turnas la kapon al la cigaredomano, se li volas suĉi je la cigaredo.

Tio malagrade tuŝas nin, la rulseĝisto iel ĝenas niajn konsiderojn. Sed ĉar ni estas en dimanĉohumuro, ni ankaŭ nun ne grumblas. Kial la rulseĝisto koncernu nin? La rulseĝisto sidas ĉe sia tablo kaj ni je nia, tiel tio estas ja en ordo, ĉu ne? Niaj rigardoj denove vagadas. Ni esperantumas plu kaj revas pri tio, kiel ni ĉiuj kune vizitos Hamburgon, aŭ Stuttgarton, aŭ eĉ Parizon.

„Ja Parizo, Tamara ekkrias!“

„Ja, kaj post Parizo ni veturos al Boulogne sur Mer, kie okazis la unua Esperantokongreso, sur la spuroj de Zamenhof!“ mi entuziasme krias.

Estas lokoj, al kiuj ni ne rajtas vojaĝi, ĉar ni kiel civitanoj de la socialisma lando GDR ne veturu en la okcidentan eksterlandon. Tiuj, kiuj estas pli egalaj ol la aliaj, rajtas veturi tien, sed tiuj estas ja politikaj gravuloj, aŭ perfidaj artistoj aŭ policaj spionoj, aŭ kio ajn, kion ni ne scias. Ni estas nur la nuloj, la randfiguroj en fia ludo. Sinjoro Blanke, la ĉefo de la esperantistoj en nia lando, mem eĉ akademiano en okcidenta organizo, rajtas veturi en la okcidenton, sed ni ne. Kial tio? Tion ni ne komprenas!

Tamara, kiu ne volas, ke ni nun ne eĉ pli ekscitiĝu, diras:
„Mi havas ideon!“

„Hoho“, vokas Udo ree rikane, „Tamara havas ideon, tio estas ja tute nova!“

„Jes, mi havas, karulo“, ŝi diras iom malĝoja, ĉar Udo estas ŝia tielnomata koramato. „Mi ja nur volis diri, ke ni eble demandu la ruĝbarbulo, li certe estas flegisto kaj konas nian konaton.“

La adepto de la krucumito ne konas lin, sed nun enmiksiĝas la rulseĝisto. Kun zigzagaj korpomovoj kaj tordita vizaĝo li elpuŝas kun konfuzita mieno kaj mola voĉo, ke tiu, kiun ni serĉas, loĝas en la proksima rulseĝista hejmo. „Estas flegisto“, li diras, „flegisto en la hejmo, jes ja.“ Tiam li iom hezitas kvazaŭ li ne povus decidiĝi pri io, sed fine li diras ankoraŭ: „Mi kunvenos, ankaŭ mi devas veturi tien.“

„Bonege“, Tamara diras por ni.

Mi ekpensas pri tio, kiel li venos ĉi tien. Estas evidente, ke la kristano veturigis lin. Sekve li akompanos nin. Sed

venis tute alie. Montriĝas, ke la juna kristano tute ne estas flegisto, sed studento, ke li nur pro afableco kunprenis la rulseĝiston per tramo ĝis ĉi tien. Li tute ne havas tempon kaj estas tre dankema al ni, ke ni transprenos la rulseĝiston por la lasta vojdistanco. Surprizite kaj iom perpleksaj ni nur kapjesas. Poste la bonkora ruĝbarbulo ekiras en la parkon kaj foriĝas inter kelkaj maljunaj kverkoj.

Mi staras konsternite apud la rulseĝo. Nur nun mi vere konsciĝas, ke la rulseĝo ja ne per si mem ekveturos. Mi komencas ŝovi ĝin. Ni iras trans la strato kun la neoklasikismaj domoj. Udo kaj Tamara ridas pri miaj mallertaj stirmanovroj. Mi ŝajnigas min surda kaj muta kaj ŝovas la rulseĝon per memkomprena mieno, sed tre tre atente. La rulseĝo veturas sur la glata kaj ebena vojo kvazaŭ per si mem. La rulseĝisto, kiu ne estas pli olda ol ni, alridas nin per siaj mokemaj okuloj. Videble li ne havas kaŭzon por plendi. Denove ni estas entuziasmaj. La mondo estas ja tamen bela, ĉu ne? La damo Suno okulumas al ni kaj en la blua ĉielo naĝas kelkaj blankaj ŝafidoj.

„Plu geamikoj, plu! Antaŭen!“ mi vokas.

„Nur rekte kuraĝe, sinjoro“ revokas Tamara,

„...kaj ne flankiĝante“, aldonas la rikananta Udo,

„...ni iru la vojon celitan!“ mi finas la diron korekte.

La rulseĝisto demandis nin: „Kia lingvo tio estas, kiun vi parolas, ĉu eble la itala?“

„Ne“, mi diras, „tio estas tute alia lingvo, Esperanto.“

„Aha“, li diras, „la internacia artefarita lingvo, ĉu?“

Nu, mi klarigas al li la aferon, kaj montriĝas, ke nia konato rakontis jam multon pri tio, ke Klaus eĉ jam pripensis, ĉu lerni ĉu ne lerni ĝin. Mi ne volas eldemandi lin pri tio. Tial mi ŝanĝas la temon. Mi demandas lin: „Amiko, diru, kiel vi nomiĝas, ni ja ankoraŭ tute ne demandis vin pro via nomo, pardonu.“

„Nepardoninde, mi estas Klaus“, li diras simple, „kaj vi?“

„Mi, Tamara“.

„Mi Udo“.

„Kaj mi, Hagen el Tronje“, mi respondas ridete.

„Do, sufiĉe morna, sed honesta ulo“, diras Klaus, kiu evidente bone legis la Kanton pri la Nibelungoj.

Mi diras senkulpigante min: „Ja ne mi elektis la nomon, sed la du aliaj.“

Kvankam la rulseĝo tre bone ruliĝas sur la glata ebena strato, estas tamen sufiĉe da obstakloj, kiujn ni devas preteriri.

Kvazaŭ kapitano Klaus ordonas kiel eviti la danĝerzonojn. Ankaŭ tio estas bela. Ĉio iras glite glate. Estas facile, tiom facile – ĉar ni ankoraŭ veturigas lin sur asfalto. Sed post la eliro el la urbo la vojo subite krute grimpas kaj grimpas. Tio jam ne plu estas tiom facila. Ĉar mi ekŝvitas, mi dividas la laboron kun Udo.

Ŝajne por konsoli nin, diras Klaus: „Tiel bone la rulseĝo ne estas, ĝi veturadas iom dekstren.“ Poste ankaŭ mi rimarkas tion.

Kiam ni estis surgrimintaj la krutan vojon, la vojo estas danke al Karlo Markso denove ebena. La veturigado de Klaus estas ree plezuro. Bela tago, vere! Pri tia plezuro ni vere ne pensis, kiam ni ektrampis. Por ni gravis nur la celo, pri la vojo ni ne cerbumis. Eble ni ja vere ne estas la montpredikaj birdoj, sed gajaj migrantoj certe!

Kaj ankaŭ ni povus kanti:

*Mi migras gaje sur la voj',
migrado estas mia ĝoj', mi migras.
Gemastroj, mi nun devas for.
Retenu min en via kor', mi migras,
migras, mi migras, mi ...*

Aŭ eble tio:

*Se donas Di' al vi favoron,
Li sendas vin for el la dom',
Por montri sian mirlaboron,
La belan mondon, al la hom'.*

Kvazaŭ Li tuj volas doni ekzemplon, ni vidas en la sekva vilaĝo kermesan amuzejon, certe pro iu vilaĝfestoj. Tio

aspektas ja alloga: Monto-valo-veturejo, ĉen-karuselo, infana karuselo kun lignaj ĉevaloj, kelkaj diversaj budoj, unu kun rostkolbasoj. Loteria budo, tio estas ja ĉi tie kiel en la vera festivo! Nu, kaj tial ankaŭ pafbudo ne mankas, por ke la bonaj civitanoj jam frue lernu kiel pafi al certaj celoj. Unue sur florojn, pli poste sur homojn, ekzemple je la limo de nia lando. Ĝisĉiela biertendego staras en la mezo. Apude kunnajlita tabula scenejo, sur kiu baldaŭ ekhurlos la stultiga industrio.

Interese estas, ke ili tie ankaŭ havas librobudon. La budo estas prigluita per buntaj papilioj. Tio nepre estas inda, ĝenerale kaj speciale pro la usona rokgrupo *Iron Butterfly*. La vendistino aspektas kiel Pipi Ŝtrumpolonga. Ŝi rigardas invitema al ni. Nu bone, ni interŝanĝas hastajn rigardojn kaj ĉiuj ni kapjesas. Do, ni eniras la kermeson.

Kun flankrigardo al Klaus ni efikigas liberan eniron ĉe la pensiulo, kiun ĉiuj nomas Fredĉjo. Li estas preskaŭ surda. Ni promesas al Fredĉjo, ke ni nur volas trinki ion, kaj tiam plu. Li kapjesas afable kaj diras nur: „Do, enŝteliĝu! Sed ne tiom paradu, kondu tu laŭorde, ĉu en

ordo?“

„Kompreneble, kion vi pensas, avĉjo?“, mi diras moke, antaŭ ol ni eniras. Ni iras rondon, iom babilas kun Pipi Ŝtrumpolonga, kiu estas bibliotekistino en la agrarkooperativo. Sed por libroj ŝi tute ne interesiĝas, des pli por muziko, ekzemple por Mick Jagger. Ni por Iron Butterfly kaj Jimi Hendrix, Klaus por la klasika muziko de Chopin. Kaj ĉiuj ni estas ŝatantoj de la GDR-popgrupoj Lift, City, Bayon, Renft, kiuj kantadas poezie koditajn ribelemajn tekstojn. Tiel ni do havas komunan temon.

Tiam ni iras en la biertendegon: Mi volas aĉeti bierojn, sed Tamara kaj Udo ja ne trinkas bieron. Pro veto! Kaj ankaŭ Klaus ne volas havi ĝin. Sola trinki bieron, tion ankaŭ mi ne volas. Tial ni aĉetas verdan asperulan limonadon, kompreneble ankaŭ por Klaus, sed li rifuzas trinki ĝin. En la tendego la diskoteko „Koloseo“ je nia peto ludas nian sekretan himnon: La kanto: „Malantaŭ vitro“ de la grupo City el Berlino. Ni kunkantas: „Mi disbatis murojn el vitro, rompis la kristal’ Sed estis nur silueta bild’, mi vekigis dum fal’. Ĉirkaŭ ni restis floroj el glaci’. Kiam mi elvenos do? Kiam mi elvenos!?“

„Ke la bonzoj tion ne malpermesis, nekredeble“, diras Udo, kiu volonte filozofumas. „Ĉu ili vere estas tiel stultaj, ke ili ne rimarkas la ironion?“

Tra mia kapo subite fulmas: Kial Klaus ne trinkas? Mi demandas lin: „Kial vi ne volas trinki, Klaus! Ĉu vi ne soifas?“

„Mi jam trinkis lakton frue, kaj dum la veturo mi prefere ne trinkas.“

„Aĥ, tiel“, mi nur diras kaj eksilentas hontigite.

Kiam ni estas denove ekstere, ni ankoraŭ aĉetas grandajn vaflojn kaj iras frate salutante al la afabla pensiulo ĉe la enirkaso, kiu ĝuste trinkas bieron. Li etendas al Klaus eĉ manon kaj diras: „Ĉu plaĉis al vi ĉe ni, juna amiko?“

„Jes“, kriegas Klaus, „bonege, kaj dankon, ke vi enlasis nin.“

„Nu, nedankinde“, diras Fredĉjo, la pensiulo-kasisto, „tio estas ja mia solidara devo, junuloj, mi estis ministro dum kvardek kvin jaroj, ministroj estas solidaraj, mi ankoraŭ

kun biciklo kaj karbidlampo veturis al la laboro, ĉiutage dekkvin kilometrojn tien kaj reen, sciu tion!“

„Nu, se tiel estas, Fredĉjo, jen mi ekkomprenas“, rimarkas Tamara ridetante, kiu cirkaŭbrakas Fredĉjon kaj donas al li kiseton sur vangon. Fredĉjo tiras la blankajn dikajn brovojn supren kaj ekbrilas, ruĝiĝante pro plezuro li flustras: „Hehe, belulino, dankegon, mia kara.“

Kaj Udo subite vokas: „Vivu Esperanto! Fratoj, manon donu kore!“

Tamara diras: „Kaj la fratinojn, tiujn vi forgesas, ĉu!“

„Kio, Esperanto?“ diras samtempe Fredĉjo, iom surprizite, „ha jes, Esperanto, pri tio mi aŭdis ion, en Lepsiko la laboristoj lernis Esperanton, estis multaj, en la dudekaj jaroj, jes ja, vi do estas esperantistoj, ĉu? Tio estas ja tre bona, ke vi faras tion, pri tio mi ĝojas, vere, mi jam pensis, ke ĝi ne plu ekzistas!“

Tamara diris tute fiera: „Ni estas esperantistoj, Fredĉjo!“
Kaj iom perplekse ŝi aldonas: „Ĉu eble ankaŭ VI iam

lernis Esperanton, Fredĉjo! Kiam, diru?“

„Ne ne, nur iomete, mi ja ne havis tempon, tro da laboro, mi jam ĉion forgesis, mia kara, estis antaŭ longa tempo.“

Ni estas impresitaj de la modesta interesa Fredĉjo, kiu eĉ konas Esperanton! Li estas ekster ĉia dubo bonulo. Kaj plej prefere ni ankoraŭ restus ĉe li, sed ni devis marŝi plu.

Tie en la foro atendas la horizonto! Ek do, radoj kaj migrantoj! Ek, al la horizonto, post la horizonto iros plu!

Ni estas denove sur la vojo kaj Tamara laŭte plendas: „Jes ja, fratoj, haha, ke mi ne ridu! Eĉ la rulseĝon mi ne rajtas ŝovi, ĉar la grandsinjoroj ne permesas tion! Kion vi diras, Klaus?“

Klaus diras iom embarasite: „Pro mi, jes, mia kara, kial ne? Mi ne estas grandsinjoro, kara, nur...“ Sed li eksilentas.

Udo transdonas al ŝi la rulseĝon kaj diras: „Bonvolu ekveturi, Tamara, kiel aĉe vi pensas pri ni.“

Tamara energie ekŝovas, sed jam post kelkaj metroj ŝi karambolas en akra vojkurbiĝo pro iu ŝtono, kiu kuŝas ĉe la vojo. Ho ve, Tamara ekruĝiĝas kaj rigardas senkonsile al ni, preskaŭ pardonpete. Ni estas terurigitaj, nur Klaus trovas tion amuza kaj diras gaje: „Vi ja ne eble volis ĵeti min en la vojfosajon?“

„Ni ekridis laŭte. Sed tion li prefere ne estu dirinta, ĉar Tamara nun tuj paliĝas pro honto. Sed Klaus diras grandanime: „Nu, ne afliktiĝu, mia kara, ja nenio malbona okazis!“

Tamara embarasite ridetas kaj ŝovas plu la rulseĝon. Mi antaŭlegas laŭte el konversacilibro. Se Tamara ne scias iun vorton, ni tradukas ĝin por ŝi. Poste mi ekzamenas ŝin laŭ la libro:

Mi: „Kiel vi nomiĝas?“

Ŝi: „Tamara Bunke.“ (Ŝi moke rigardas.)

Mi: „En ordo, do la amikino de Che, kio vi estas laŭ profesio, instruistino pri la amhara lingvo?“

Ŝi: „Ne, nur studento de la amhara.“

Mi: „En kiu monato vi planas libertempoj?“

Ŝi: „La tuta jaro..“

Mi: „La tutan jaron.“

Ŝi: „Stulta demando!“

Mi: „Ne mia kulpo. Kie vi intencas pasigi vian libertempon?“

Ŝi: „En Parizo, senkoste ĉe esperantistoj, se eblas.“

Mi: „Kiomope?“

Ŝi: „Kiom kio?“

Mi: „Ĉu unuope, duope, aŭ trio-pe?“

Ŝi: „Unuope.“

Mi: „Sen ni ambaŭ?“

Ŝi: „Jes, kompreneble sen vi kaj sen li.“

Mi: „Kial?“

Ŝi: „Kial la bananoj estas kurbigitaj?“

Mi: „Tion vi scias mem, mia kara.“

Klaus subite interrompas nin: „Ĉu vi ĉiuj eble volas fariĝi radukistoj?“

Mi estas iom perpleksa, ĉar mi pri io tia ankoraŭ neniam erbumis. Mi tradukas de certa tempo de B. Traven „La Mortulan Ŝipon“ en Esperanton, sed ĉu mi fariĝu tradukisto, pri tio mi ankoraŭ neniam pensis.

Tamara diras: „Mi fariĝos interpretisto por la amhara lingvo. Eble mi iros al Afganio.“

„Kaj vi, Udo?“ diras Klaus.

„Nu, mi estas lumigisto en teatro, mi iros al Stuttgart, tie mi havas kamaradon en la lumigista trupo. Tiu jam foriĝis al la okcidento, kaj skribas al mi ĉeokaze pri sia laboro tie. Kiel li fuĝis, tion scias neniu. Estas mistero.“

„Kaj vi, Hagen“, demandas Klaus plu.

„Mi aĉetos al mi ie en la Nigra Arbaro arbodomon, dek metrojn super la tero, kaj tie mi ekloĝos“, mi respondas tute serioze. Sed Klaus, kiu jam iom konas min, ne kredas tion al mi. Tiel ni plezure plu babilas kaj ruligas ĉe tio la rulseĝiston Klaus en sia rulseĝo en la rulseĝistan hejmon. Ĉu tio ne estas grandioza? Jes, ĝi estas! Sed laŭdon ni pro tio ne meritas. Estis ja nur hazardo, ĉar ni serĉas la flegiston.

Kelkajn minutojn poste Klaus proponas cigaredopaŭzon. Ni haltas kaj prenas post lia peto la cigaredojn por li el la dorsosako. Klaus insistas pri tio, ke ni fumu de liaj. Estas nur la aĉa marko „Juvelo“, sed en senespera situacio la diablo fumas ankaŭ cigaredojn de la marko „Juvelo“, ĉu ne?

Mi rimarkas, ke Klaus estas iom ĝenata, ke ni devas helpi lin. Kia sento devas esti, se oni eĉ cigaredon ne povas fumi sen helpo de aliaj? Mi ne povas imagi tion, sed respekton mi havas por Klaus! Kiom da vivoforto devas esti en li, ke li eltenas tiun vivon kun tioma humuro?

Antaŭ la celo ni ankoraŭ dubas; ĉu vere estas la hejmo?
Malproksime de ĉia civilizacio, la domoj aspektas iom tiel
kvazaŭ oni kaŝis ilin intence. Pro honto, ke tiaj
handikaptitoj en la socialismo ekzistas, ĉu? Tiuj, kiuj
formetis ilin ĉi tien, certe tute laŭte ekkrius, ke ne! Ke tio
estas tute alia afero. Sed kial pro kio en la mondo ili
tiukaze devas vivi ĉi tie? Kvin kilometrojn for de la urbo
kiel sur insulo, kvazaŭ kiel punkaptitoj?

Belulino Suno nun estas en la zenito kaj radias agressive,
la ŝvito elfluas el ĉiu haŭtporo. Ĉu ni vere trovos la
flegiston?

Klaus ekkonas kiel la unua, ke efektive estas la hejmo. Li
montras al la plata vojo de la eniro. Do, ni alvenis. Pli
bone: Klaus alvenis. Ni ŝovas lin internen, kie li tuj estas
akceptata de flegistino.

Ŝi estas malkontenta kun li: „Klaus, kie vi nur restis, ni
ĉiuj jam senpacience atendas vin!“

Baldaŭ alĝapas nin tute eksterordinara rondo da
kafotrinkantoj ĉe la longa tablo en la kultura ĉambro, kiu

estas feste aranĝita. Ili kolektiĝis tie, sidante sur siaj rulseĝoj kiel kafoklaĉrondo, kiu ankoraŭ devis atendi je la plej grava persono de la tago.

Estas Klaus, kiu hodiaŭ havas sian naskiĝtagon, kaj kiu tute ne diris tion al ni!

Ni ekscias, ke Klaus propre devis atendi ĉe la blankaj tabloj en la parko ĝuste je tiu flegisto, pro kiu ni venis, kiun ni serĉas. Nu, la renkontiĝon ni estus povintaj realigi pli facile, ĉu? Sed kion fari? Nun ni estas ĉi tie, kaj nenio restos al ni krom atendi lin. Kaj tial ni sidiĝas al malgranda tablo apud la granda festtablo, ĉar tiu estas jam tute okupita. Multaj rulseĝistaj okuloj rigardas scivoleme al ni, ni estas embarasitaj kaj plej volonte kaŝiĝus post unu el la senvidebligaj maskoj, kiuj en fabeloj tiom ofte estas uzataj en tiaj okazoj.

Kvankam ni estas embarasitaj, ni iras al Klaus kaj gratulas lin je lia dudeka naskiĝtago. Ni ĉirkaŭbrakas lin, homon, kiun ni matene ankoraŭ ne konis! Udo prenas por Klaus la trinktigon el la dorsosako kaj Tamara ŝovas la kukon tien antaŭ lin, kie li perbuŝe povas deŝiri pecon

post peco.

Kvazaŭ revenus la malbono

La geedzoj Ruth kaj Udo Vager ekskursis kun sia ruĝa antikva Citroen, kiu inter kampoj kaj en arbaroj bonege uzeblis. Sur kampvojo ne tre malproksime de iuj vilaĝoj ili neatendite haltis pro paneo, estis jam post noktomezo.

Sinjoro Vager serĉis la kaŭzon de la difekto, sed ne trovis ion. Ĉar la vojo sur neniuj mapoj troveblis, ili eĉ ne sciis precize, kie ili estas. Sed, kiam ili ĉirkaŭrigardis pro domo, helpis fortuno. Pli proksime ol cent metrojn, en la hela pala lunolumo, konturiĝis la silueto de strange kurbigita kasteleca domo alte sur monteto. Ĉar neniuj el la fenestroj estis iluminata, la domo aspektis minaca. Sinjorino Vager restis pro tio en la aŭto kaj diris iom timeme al sia edzo: „Eble vi tie supre en la domo povos telefoni iun noktoservon, Udo.“

La viro ekiris kaj grimpis sur la kruta monteto supren. Forte enspirante li alvenis supren. En la domo iu funkciigis lumon kaj poste virino lante malfermis la grandan pezan enirpordon, kiu knaris kiel homa estaĵo.

Tiumomente Ruth vidis kiel la edzo gestadis en la

kegloforma lumo. Li enpaŝis. La kompakta peza nigra pordo de la domo fermiĝis brue post li.

Ruth Vager atendis plena de senpacienco je lia reveno, kiu laŭ ŝia sento pli kaj pli prokrastiĝis. Jen subite la pordo krake remalfermiĝis kaj sinjoro Vager kun kliniĝinta kapo elkuris. Kiel ĉasate li hastis malsupren kaj fine reen al la aŭto kaj fermis la pordon post si. Li estis pala kiel la tuko de mortinto kaj liaj manoj tremis.

Lia edzino demandis ekscitite: „Udo! Kio estas? Kio okazis al vi? Diru!“ Sed li silentis kvazaŭ li estus surdomuta.

Kiam lia paniko perdiĝis, li komencis paroli: „Ruth, mia kara, kiel mi klarigu tion al vi? Kiam mi enpaŝis en la domon, salutis min olda damo, kiu timige aspektis. Ŝi havis firman, preskaŭ dolorigan manpremon. Ŝi diris nenion al mi. Sed ŝia rigardo hirtigis mian haŭton. Mi volis peti ŝin pri helpo, sed tiam trafis min ŝia trapenetrema fatala rigardo kvazaŭ kiel pugnobato. La fridaj kruelaj okuloj de tiu sorĉistino direktiĝis per tia senhoma dureco al mi, ke mi havis la impreson, kvazaŭ

oni eltranĉus mian langon. Vi scias, mi ne estas konfuzemulo aŭ malkuraĝulo. Sed tamen ŝi tiom ŝokis min! Mi staris kvazaŭ mi estus glaciigita. La malbona vizaĝo de la oldulino faris min sendefenda dum momento. Kiel sensignife estis subite, ke ni ne povas starti nian aŭton. Nekredebla preskaŭ panika timo leviĝis en mi. Sed tamen mi ne estus povinta diri pro kio. Okazis ja preskaŭ nenio, se oni rigardas la faktojn. Estis ja nur morna olda damo, kiu gapis min kun hatoplena vizaĝo. Mi rektiĝis kaj provis elteni ŝian rigardon. Sed ankaŭ ŝi min fikse rigardis. Ŝi ne provis alparoli min, aŭ eĉ enlasi. Kiam mi fine ekkuraĝis rigardi pli longe al ŝia vizaĝo, mi subite komprenis, kial mi tiom teruriĝis. La damo aspektis precize tiel kiel onklino Vera Eisner, kiu antaŭ multaj jaroj ĉeokaze transprenis la prizorgadon de mi kaj de mia fratino, kiam niaj gepatroj ankoraŭ ofte vizitis teatrojn. Bonan rilaton al ŝi, almenaŭ dum certa tempo, ni havis neniam. Ŝi estis tute alia ol normalaj homoj. Kiam niaj gepatroj malĉeestis, ni havis ĉiufoje la senton, kvazaŭ mekanika pupo staras antaŭ ni: neniuj afablaj vorto, neniuj rideto, neniuj karesoj. Ŝia glacie frida vizaĝo estis daŭra riproĉo, kiu bruligis sin en niajn infanajn

korojn. Mi povas rememori tion, kvazaŭ okazis hieraŭ. Mi sentis min ĉiam kulpa esti juna, kulpa esti ĝoja, kulpa havi afablajn amplenajn gepatrojn. Ni ribelis kontraŭ ŝi, sed niaj gepatroj ne komprenis nin, ili demandis perplekse, kio ne plaĉas al ni je nia – konsentite iom stranga – onklino. Estis por ni infanoj tute ne eble esprimi tion. Ŝi ne batis nin, ŝi ne insultis nin, ŝi nur severe traktis nin. Ŝi fakte enprizonigis nin dum ŝi transprenis la respondecon pri ni. Ŝi konservis nin kiel mortajn fiŝojn, ŝi traktis nin kiel domservistojn. Kia ŝtono falis de niaj koroj, kiam ni subite estis liberaj de tiu onklino. Neniu diris, kial. Ni eksciis nur multe pli malfrue, pro kio ŝi tiel abrupte foriĝis el nia vivo. Iu asertis, ke ŝi malfermturnis la gaskranon en la kuirejo kaj poste enŝlosis sin en la loĝejo. Kiam la polico trovis ŝin, ŝi laŭdire jam tri tagojn estis morta. Sed tio eble estis nur onidiro. Sed fakto estas, ke ŝi venenigis sinjorinon, kiun ŝi flegis dum la lastaj tri monatoj. Sed pro rutina kontrolo oni eltrovis fine, ke ŝi murdis ŝin kun centprocenta verŝajneco. Kiam la polico volis aresti ŝin pro tio, ŝi laudire jam estis morta.

Eble vi ne kredos al mi, sed kiam mi ekvidis tiun teruran oldan damon kaj tiel la strangan onklinon, mi havis subite la ŝanceligan svenenigan senton, ke fantomo, morta reiranto, staras antaŭ mi, kvazaŭ revenus la malbono, ĉu vi komprenas?

Kiam ŝi fine kun la monotona grakanta voĉo de la onklo demandis min, kial mi tiel stulte gapas al ŝi, mi balbutis ion pri alia simila persono, kiu aspektas kiel ŝi, sed ŝi nur ekridis historie kaj tiam fikse rigardis min tiel, kvazaŭ mia vizaĝo estus pejzaĝo nekonata. Ŝi diris en la plej frida tono, kiu imageblas, ke ŝi ne aĉetas ion de mi, kaj kion mi do volas de ŝi, post noktomezo, en tiu aĉa de Dio forgesita regiono, ke ŝi min ankoraŭ neniam vidis.

Mi rakontis al ŝi pri nia problemoj kaj tiam ŝi manpetis min internen. Mi estis sendecida, la obtuza sento eĉ ne forlasis min, kiam ni iris supren la ŝtuparon.

En la loĝoĉambro tiam io okazis, kio denove hirtigis mian haŭton. La ĉambro aspektis tute tiel, kvazaŭ mi jam vidis ĝin iam. Ankaŭ la staranta horloĝo aspektis, kvazaŭ mi ĝin jam vidis ie, sed certe ne en horloĝa muzeo. Kaj nun

eĉ la krucifikso tie sur la muro, kiun mi estis ŝtelinta laŭ ŝia firma konvinko.

Estis stranga temposalta momento. Per unu fojo mi estis denove la kulpokonscia knabo, mergiĝinta en la pasintecon kaj staranta antaŭ la severa onklino, kiu demandis min kun pereiga rigardo, ĉu mi ankoraŭ estas tute klara en la kapo, kion mi babilaĉas pri malfacilaĵoj ktp. Kaj poste ŝi prenis eĉ lambastonon en la manon kaj puŝis per la pinto malestime al mi, kvazaŭ mi estus insekto, kiun oni devas neniigi. Kaj tiam ŝi diris subite akre, ke mi estas perfekta idioto, ĉar mi eĉ ne havas poŝtelefonon por tiaj noktaj okazaĵoj, kaj tial devas molesti oldajn damojn. Ŝi fariĝis poste pli kaj pli laŭta kaj histeria. 'Foriĝu, fripono, trompisto', ŝi kriis, 'eble vi eĉ planis rompŝtelon, rabatakon ĉe olda sendefenda damo. Tiam ŝi ĵetiĝis al mi, tute proksimiĝis kun venea spiro kaj ŝovis min krude per la lambastono al la elirejo.

Mi fuĝis haste la ŝtuparon malsupren, kvazaŭ temus pri mia vivo. Kiam mi turnis la kapon por eviti ŝiajn atakojn, mi vidis alte sur la muro grandan mornan olean pentraĵon. Ĝi montris la onklinon en ŝia spartece meblita

loĝejo en Lepsiko. La virino sur la bildo rigardis malsupren al mi, kruele, ja diable. La moka ridado de la olda damo, kiu puŝadis min antaŭ si, persekutis min, ĝis mi sukcesis fermi la pezan elirpordon post mi. Ankoraŭ sur la monteto malsupren mi sentis, ke ŝi kuras post mi...“

Sinjoro Vager finis sian paroladon kaj rigardis konfuzite sian edzinon. Tiam, preskaŭ almozpetante pro kompreno, li flustris: „Ruth, tio estis tro freneza, mi simple ne povas kompreni, kio ĵus okazis.“

Kiam Ruth Vager rimarkis ungecan gratadon je la aŭtofenestro ŝi turnis ŝokite la vizaĝon. Ekstere staris kliniĝinte, ekkriante kun tordita vizaĝo, la manojn kiel lupajn unĝojn metinte sur la vitrotabulon – la terura fantomeca olda damo.

La estonta magiisto

En la subdistrikta kabineto por kulturlaboro de la provincurbo Altenburg sidis tri inaj kaj du viraj kunlaborantoj ĉirkaŭ la kunsida tablo. La Germana Demokratia Respubliko ankoraŭ ekzistis, kaj neniu el ili, eĉ ne la plej aŭdaca, iam serioze pensis pri tio, ke tio povus ŝanĝiĝi iam. Ili havis notblokojn antaŭ si kaj aŭskultis atente, kion la ĉefino Sonja Vesperruĝa antaŭlegas el la gazeto „Nova Germanio“. Temis pri la tielnomataj „devizodeliktoj“ de la civilkuraĝa verkisto Stefan Heym.

Sonja Vesperruĝa, malgranda ino, ĉiam vigla kiel merlo, estis preskaŭ kvindekjara kaj tamen aspektis ankoraŭ kiel lerneja knabino, svelta, delikata, sed kun severa hardislimo en la mezo de la nigra duonlonga hararo, kiu aspektis iom pastrineca. Sinjorino Vesperruĝa estis konvinkita partiano de la partio SED, do de la reganta Socialista Unuiĝinta Partio de Germanio. Ŝi centprocente kredis tion, kio estas skribata en la gazetoj.

Sed en tiu tago la legado ne iris tiel glate kiel kutime. La

juna kunlaboranto Tomas Hagen intervokis kaj provokis ŝin, kaj la aliaj almenaŭ per malŝataj rikanoj montris, ke ili staras sur lia flanko en tiu afero. Spite al stranga malpermeso de la supera enurba kulturoficejo, li sekrete partoprenis ĉe la prelego de la fama aŭtoro en kapelo, al kiu invitis amikara societo de la evangelia eklezio. Tomas, kiu jam pro sia nomo ne tuj kredis ĉion, kion iu diras, estis tamen impresita de la trankvila maniero de la verkisto Heym, kiu ne lasis provoki sin de iuj tutcertaj komisiitoj de la "organoj" de la ŝtatsekureco.

Pro la hipokrita gazetinformo Tomas indigniĝis kaj ne plu povis reteni sin rakonti pri la suverena prelego. Nerveze li trafosis per la fingroj sian barbon, kiu faris lin multe pli olda ol li estis.

Sed kiam la diskuto jam fariĝis frosta pro la akre defendataj kontroversaj starpunktoj, malfermiĝis subite la firma kverka ĉambropordo de la kunsidejo. Envenis svelta junulo kun brilaj nigraj okuloj kaj blue nigra hararo, kiu en bunta ĉemizo kaj blanka ĵinzo enŝvebis kiel bela papilio, kvazaŭ sur flugiloj de mistera vento, per gracilaj dancistaj paŝoj. El lia afabla vizaĝo lumis la plej

ĉarmaj okuloj de la mondo, inspirantaj konfidon.

SinJORINO Vesperruĝa ĝojis pri tiu ĝustatempa interrompo, kaj kiam ŝi pli precize rigardis la enpenetrinton, ŝia mieno heliĝis eĉ pli. Ŝi finis la malagrablan kunsidon kaj iris kun la neatendita gasto en sian ĉambron.

Tie ŝi petis la junulon sidiĝi. Ŝi demandis pro lia nomo kaj li respondis: „Giridhar Ĉaŭduri.“

„Kiel, bonvolu? Ĉaŭduri, tio estas ja interesa nekutima nomo, ĉu vi estas eksterlandano? Kie vivas viaj gepatroj?“

„Mia patro estas barata, do hindia diplomato, laborinta ĉe la ambasadejo en orienta Berlino, sed nun li loĝas denove hejme en Hajderabado, li estas bramano.“

„Bramano? Ha jes, la fia kasto, kiu ankoraŭ nun, post Mahatmo Ghandi, ekspluatas sian kompatindan popolon, sed pardonu, tio ja ne estas via kulpo, kaj via patrino, kion ŝi faras?“ interrompis lin sinJORINO Vesperruĝa.

„Mia panjo plu estas civitano de nia GDR kaj laboras kiel

interpretisto.“

„Aha, tiel do“, komentis la ĉefino, videble iom trankviligita, ĉar ŝi jam antaŭtimis iujn malagrablajn komplikaĵojn.

„Kaj kion vi deziras de ni, sinjoro Ĉaŭduri, kial vi venis en nian oficon?“ ŝi diris senemocie.

„Mi volas antaŭ ĝusta magiista komisiono pruvi mian taŭgecon kiel magiisto. Mi aŭdis, ke oni turnu sin en tiu kazo al la afabla sinjorino Vesperruĝa, vi estas ja sinjoro Vesperruĝa, ĉu ne?“ li demandis flate.

Lia ensorĉiga rideto trafis ŝin kiel fulmo. Ŝi havis precipan emon al junaj viroj, sen vere konsciiĝi iam pri tio, kaj tial ŝi ankaŭ ne povis konfesi tion almenaŭ al si mem. Ŝi vivis sola, kaj tial ŝi ne spertis pri sentoj al junuloj.

Giridhar respondis ĉiujn ŝiajn demandojn mirige memkonscie, parollerte kaj ĝentile. Li parolis seneraran sendialektan germanan, kiu estis sufiĉe bona por povi fariĝi parolisto en unu el la du televidaj kanaloj de GDR.

Kaj tamen li ankoraŭ lernis en abiturklaso en la Karl Marks-lernejo en Altenburg.

Videble li estas knabo kun granda talento, ŝi pensis. Giridhar baldaŭ elflaris, ke ŝi havas simpation por li. Tial lia parolo fariĝis pli kaj pli entuziasma. Je la fino li rakontis nun jam preskaŭ intime pri lia decida unua renkonto kun la magio. Temis pri la prezentado de magiisto en la rusa ŝtata cirko.

„Imagu“, li diris, „li forsorĉis cirkoklaŭnon ŝvebant en la aero. Spirhaltiga okazaĵo! Sed la kulmino estis, kiam li metis en kaĝon sian asistantinon, kiu ĉe tio sur manplato forflugigis kisetajn kvazaŭ ili devus sufiĉi por mil da homoj, kaj poste ĵetis tukon sur la kaĝon kaj dum malpli ol sekundo reaperigis la asistentinon kiel leoninon. Imagu, sinjorino!“

Sinjorino Vesperruĝa devis iom ridi pri la subita transformado de virino en leoninon. Kaj tial ŝi diris ridete: „Jes ja, tian magiiston ni bezonus, tiaj virinaj leonoj mi volus havi en nia oficejo!“

Kaj tiam ŝi aldonis jam denove pli serioze: „Vi do volas fariĝi magiisto, sinjoro Ĉaŭduri. Nu, en tiu kazo mi gratulas el mia tuta koro al via decido. Ni helpos vin ĉe tio, ĉar estas nia profesia devo. Kiel ĉiu alia popolarto, kompreneble ankaŭ la magia estas ŝatata kaj subtenata en nia ŝtato de la laboristoj kaj kamparanoj. Tio estas cetere ne tiel kutime en nia plagata mondo, juna viro, se oni foje lasas flanken niajn amikajn fratajn socialistajn ŝtatojn sub la gvidado de la gloriĉa Sovetunio! Revenu do post semajno je la sama tempo, tiam mi povos diri jam pli al vi. Iun solvon ni certe trovos.“

Sinjinorino Vesperruĝa baldaŭ konstatis en la interparolado kun la Centra domo por kultura laboro en Lepsiko, ke la junulo laŭ la regularoj ankoraŭ estas tro juna por magiista ekzamenado. La gvidanto de la centra laborkomunumo „Magia rondo“ estis skeptika kaj malkonsilis al ŝi la antaŭtempa ekzamenadon, kiu estus tute nekutima kaj ne tuj permesebla sen iuj pli altaj instancoj. Krome li atentigis ŝin pri tio, ke li ankoraŭ neniam ion aŭdis pri tiu juna magiisto Ĉaŭduri. Sed sinjinorino Vesperruĝa volis scii nenion pri tio, ĉar por ŝi la

granda talento de Giridhar estis ekster ĉia dubo. Ŝi telefonis al la ĉefo de la Centra domo, kaj tiu promesis helpi al ŝi, ĉar li konis ŝin persone.

Pro tio, ke por la fina decido de la ekzamena komisiono necesis ankoraŭ kelkaj certigaj telefoninterparoladoj kaj aliaj helpemaj agoj, ŝi petis la kunlaboranton Tomas Hagen, ke li transprenu la zorgadon de la onta magiisto. Nur la interkonsentigajn interparoladojn kun la komisiono kaj la aliaj instancoj ŝi rezervis por si mem.

Kiam Giridhar Ĉaŭduri revenis je la fiksita tago, la kunlaboranto Hagen tuj akceptis lin. Ili interkonatiĝis kaj tuj ciis sin reciproke, ĉar tio estis por ambaŭ pli agrabla. La roloj en tiu nova ludo estis rapide disdonitaj. La adorenda Giridhar sur unu flanko, kaj sur la alia flanko Tomas, la komprenema amiko kaj helpanto, kiu subtenas la venontan geniulon. Ili renkontiĝis ekde nun tute senceremonie, kelkfoje en la kafejo „Volksstädt“ apud la poŝtejo, la plej preferatan retiriĝan lokon de Tomas, sed post kelkaj fingromontaj admonoj de la ĉefino pli ofte en la griza kulturkabineto.

Giridhar tie ensorĉis ĉiujn kun sia malferma karaktero. Eĉ la misfide observema kaj hezitema financekonomistino Uta opiniis, ke li estas tre agrabla bubeto. Lia lerta parolmaniero kaj liaj spritaj ŝercoj perpleksigis ĉiujn. La damojn lia aspekto kaj lia ĉarmo ĉiufoje tute entuziasmigis. Estis vere strange. Kiam Giridhar aperis, ŝvebis tuj iu orientala plezuro de la sensoj en la ŝpareme meblitaj oficejaj ĉambroj. La burokrata leĝo de inercio en lia ĉeesto malvalidiĝis ĉiufoje. La ĉefino ĉiam tuj ekfloris, kiam ŝi nur ekvidis lin. Ĉiuj estis tuj pli gajaj, pli flugilhavaj, pli parolemaj, kiam li ĉeestis. Oni interrompis la laboron kaj trinkis sennombrajn kafojn. Oni ridis kaj ŝercis. Giridhar faris grandiozajn prelegetojn pri la magia arto, klarigis la diferencon inter iluziisto kaj manipulatoro, li montris kiel oni dissegas virinojn kaj ekkaptas pistolkuglojn per la nura buŝo. Li klarigis la ŝnurtrukon kaj montris sin ravita de fakiroj, fajrokurantoj kaj aliaj mirakloplenumantoj kaj saltis aeren pro entuziasmo pri la ŝvebanta kuglo, kiun cetere ankaŭ li havis en la programo, kiel li asertis memfide. Ĉion tion li rakontis en la plej amuza babiltono, kiu indus por pajaco. Sin mem li karakterizis modeste kiel

parolantan magiiston.

Sed ju pli Tomas konatiĝis al sia nova amiko Giridhar des pli li havis dubojn pri la vero de liaj eldiroj. Giridhar estis certe ensorĉiga homo, sed ĉu li vere estis bona magiisto, kiel li asertis pri si mem? Ĉu li ne male pli similis al la mensogobarono, kiu sur fazeolo grimpis ĝis la luno? Giridhar, kio bedaŭrinde pli kaj pli klariĝis, estis nur blagulo, kiu havas tro da fantazio. Li rakontis aferojn, kiujn eĉ la plej granda fidulo daŭre ne povus akcepti. Li frekventis laŭ lia aserto retorikkurson ĉe la plej konata sportreportero de la lando, ĉe Hans Florian Oertel en Berlino. Kiam li faris tion, li ne diris. En Lepsiko sur la ĉevalkurejo li ricevis senkoste – pro bonaj rilatoj al influaj personoj – kurson por rajdistoj. Li asertis eĉ, ke la lepsika kabaredisto Juergen Hart de la „Akademiksuloj“ helpis lin ĉe la skribado de siaj skeĉoj. Kiam la paciencofadeno de Tomas fine disŝiriĝis pro tiom da fanfaronado, li demandis lin tute krude: „Diru foje, Giridhar, kiam vi cetere vizitas la lernejon, se vi estas tiom okupita? Kiel vi faru vian abituron? Kaj de kie vi prenas la tutan monon por ĉio tio, kion vi faras laŭdire?“

Sed Giridhar, kiel ĉiam, lerte elturniĝis el ĉio. La fanfaronadoj kompreneble baldaŭ rondiris en la kabineto, tiel, ke oni kaŝe ekhavis la opinion, ke la knabo estas centprocenta fabelrakontulo, kaj ke li verŝajne tute ne povas sorĉi!

Kvazaŭ por substreki tiun opinion, aperis ĝuste en tiu tempo plia hobimagiisto kun la nomo Popovic en la kabineto. Kiam li aŭdis de la antaŭpreparata magiista ekzameno, li terurigite kunklakis la manojn kiel kristana preĝemulo kaj ekkriĉis kiel ĵus vundita besto: „Tiu kanajlo! Li ŝtelis la lastajn tri jarkolektojn de la gazeto 'Magia arto' el mia loĝejo kaj ne redonas ilin al mi. Li impertinente pretendas, ke mi ne donis ilin al li. Imagu, tia venthundo! Kaj tian ventfarulon vi fidas, kion li diras, estas ja tute absurda! Ĉu vi tion vi ne tuj rimarkis, ke li estas nur fanfaronulo? Diru, ke tio ne estas vera!“

La malgranda, iom korpulenta kaj ruĝvanga Popovic, kiu perlaboris al si pene la monon por la multekostaj magiistaj aparatoj kaj instrulibrooj kiel diskotekisto, skuis preskaŭ rezignante la kapon kaj diris mirigite: „Kara Tomas, vin mi ne imagis tia naiva ŝafo, vere ne!“

Giridharon mi konas el la magia klubo de la junaj laboristoj en Borna. Li estas absoluta ridindulo. Li ne regas eĉ unu trukon ĝuste, vere ne, kredu min! Mi avertas vin, vi devas informi sinjorinon Vesperruĝa, alie tio fariĝos katastrofo!“

Al la kunlaboranto Hagen ne restis alia eblo ol informi sinjorinon Vesperruĝa pri la novaĵoj, kvankam ne estis lia maniero fajfi iun ĉe la superuloj. Ankaŭ tial li devis informi ŝin, ĉar la ekscitita Popovic nun certe repostulus siajn magiistajn kajerojn helpe de la kabineto.

Sinjorino Vesperruĝa, kiu intertempe jam rilatis al Giridhar kvazaŭ li estus la propra filo, tute ne estis ŝokita de la novaĵoj. Ŝi male diris nur seke: „Tio estas ja nenio alia krom fiaj onidiroj pri esperiga reprezentanto de nia socialista junularo, al kiu devas aparteni nia tuta konfido! Tiu ĉi Popovic ja nur envias nian karan Giridhar. Ke la ulo estas ĉio alia kiel lumturo, se temas pri sia talento, ni ja scias pro lia ekzamenado kiel diskotekisto, kiun li trapasis kun sukceso nur tial, ĉar mi persone transprenis la respondecon por tiu nelerta malgraciulo. Ke li povas sorĉi, mi tute ne povas imagi al mi, mi prefere supozas, ke

li simple envias nian elegantulon Giridhar, kiu jam de ekstere aspektas multe pli impresa ol tiu dika kaj eterne ŝvitanta Popovic, kiu neniun frazon povas eligi sen tio, ke oni tuj rimarkus, ke li venas el la cepourbo Borna en Saksio. Cetere, kiam ni ĉi tie devus kontroli ĉiun denuncon, ni bezonus por tio detektivan oficejon, Tomas.“

Kunlaboranto Tomas Hagen prefere ne kontraŭdiris ion, kvankam li havus sufiĉe da kaŭzoj fari tion.

Kiam Giridhar en la ĉambro de la amiko Hagen kun mieno de iniciito antaŭmontris la eksteron de verda indentigilo, kiu laŭ li mem atestas, ke li estas membro de la organo pri ŝtata sekureco, Tomas eksplode ekfuriozis: „Facilanima damnita knabo, vi videble stulte imagas, ke vi povus akceli per tiu truko la aferon pri la ekzamena termino! Sed mi diras al vi, vi estas sur la plej bona vojo riski pli ol nur la magiistan ekzamenadon. Giridhar, idioto, formetu tiun damnititan indentigilon, kaj faru tion neniam denove! Pro vi, sed ankaŭ favore al ni! Se vi ne emas al prizonĉelo en Bautzen!“ Li preskaŭ alkriis lin kun akra tono. Giridhar ruĝiĝis en la tuta vizaĝo kaj respondis

embarasite: „Tio estis ja nur ŝerco, karulo, kial vi tiom krias?“

SinJORINO Vesperruĝa atingis pro sia obstino post longa batalo, kion ŝi ĉiam alstrebis: la ekzamenkomisiono letere informis ŝin per multaj vortoj, ke oni venos je la proponita termino kun malgranda delegacio el spertaj kaj multmeritaj magiistoj al Altenburg por tie „en la kadro de la efektivigo de esceptokaza aparta reguligo“ ekzameni la magiistajn kapablojn de la abiturlernanto Giridhar Ĉaŭduri.

SinJORINO Vesperruĝa ankoraŭfoje konfirmis la terminon kaj Giridhar mem tuj presigis flavajn vizitkartojn kun bombasta nigra teksto, sur kiuj li mem prezentiĝis kiel sorĉisto en longa mantelo, kun pinta ĉapelo kaj libere ŝvebanta kuglo. Tomas nur skuis la kapon, kiam li legis sur tia karto, ke la granda artisto Ĉaŭduri majstris kun brila sukceso la ŝtatan ekzamenadon.

Tiam aperis en la regiona parto de la „Popolgazeto“ tutpaĝa anonco, en kiu Ĉaŭduri invitis la loĝantojn en kaj ekster la urbo, ke ili venu al la granda magiista horo en la

klubdomon de la junularo, kiu okazos en la granda paŭzo de la diskoteko „Rasputin“. Kiel foirplaca kriisto li finis la anoncon per trilingva verso:

Invitas vin kun sorĉa vok'

magia fil' el via lok'

iluziisto de l' epok'!

La anonco, kiu en la kabineto estis kontroverse diskutata, trovis en la urbo multajn legantojn. Ŝajne sensacio atendeblis. La majstro Giridhar mem gluis afiŝojn je ĉiuj kolonoj kaj sur aliaj reklamaj areoj.

Fine la granda tago alvenis. La kultura domo, pli konata kiel "lagodomo", plenigis sin iom post iom per junuloj. La tripersona magiista komisiono, veninta spite al grandaj duboj kaj certe ne tute libervole, sidis kun sinjorino Vesperruĝa ĉe malgranda tablo sur la alta galerio, kie oni havis bonegan videblon al la scenejo. Apud ili sidis ankaŭ Tomas Hagen, kiu atendis la decidan horon kun tre miksitaj sentoj.

La scenejo estis riĉe ornamita: malhele blua ĉielo plena

de oraj steloj kaj duonlunoj vere impresis. Granda bunta magia kubo ĵetis kiel diskoteka kuglo kolorlumojn sur la vizaĝojn de la rigardantoj. La diskoteko „Rasputin“ ludis fone svingodancojn de Glenn Miller kaj Fips Fleischer, tute tiel, kiel oni antaŭe postulis tion de ili. La du diskotekistoj estis eĉ feste vestitaj per ruĝaj kravatoj kaj elegantaj jakoj.

Ĉiuj atendis je Magius Ĉaŭdurius, la grandan magiiston, kiel li mem nomis sin en la anonco. Sed la majstro lasis atendi la scivolulojn. Daŭris tutan horon antaŭ ol li – laŭdire pro aŭtopaneo – fine aperis. Sub la jubilo de la ordiga trupo, kiu staris kiel brua motorradbando ĉe la enirejo, li enmarŝis kun ligna ĉaro plena de magiista ilaro en la kulturdomon. Sur la scenejo li manipuladis nerveze dum iom da tempo. Kun la helpantoj li starigis kulison, kiu memorigis je restoracia Mitropa-vagono de la fervojo en GDR. Oni alportis ankaŭ grandan maristan keston, kiu ŝajnis iom fremda sur la scenejo.

Post duono de horo la preparoj estis faritaj kaj la lumo estingiĝis. La spotlumoj ekfunkciis kaj direktiĝis al la mezo de la scenejo. La spektaklo estis komenciĝanta.

Magius Ĉaŭdurius, vestita kiel Mitropa-kelnero, aperis ŝanceliĝante kiel ebriulo kaj klarigis en terura saksa dialekto, ge li giel gelnero brou la „foirou en Lajbdzŝ havas diom ta laborou, ge li drinkis bro diom da ĝagrenou iom drou mulde, gion li normole ne fouras.“

La rigardantoj kaj la komisiiono estis iom perpleksaj kaj kelkaj ridis laŭte. Sed la plej multaj silentis ĝenate, ĉar ili devis pensi pri la „sankta bovino“ Foiro de Lepsiko, pri kiu la gvidantoj de la partio, kaj ne nur ili, estis tiom fieraj.

Tiam la ekzamenato petis longan ulon de la ordiga trupo sur la scenejon, ordonis lin sidiĝi ĉe la tablo, metis sektbotelon antaŭ ties nazon kaj provis eltiri el la botelo vicon da interplektitaj buŝtukoj, kio post kelkaj provoj vere iel sukcesis. Ĉar la rigardantoj denove ne sciis, kion tio signifis, ili prefere silentis plu. Eble ili pensis, ke la mallerta antaŭluda artifiko estis intence farita, por ke oni poste eĉ des pli miru pri la eksterordinaraj kapabloj de la magiisto. La ebrie aspektanta sorĉisto fariĝis nervoza. Li prenis el la poŝo kartludon kaj provis miksi ĝin en la aero per svinga vasta movo. Sed la karto falis preskaŭ ĉiuj sur

la plankon. Ĉar la kartoj ankaŭ post la tria provo prefere surplankiĝis, li rezignis pri plia ripetado. Frosta silentado de la rigardantoj estis la kvitanco por tiu fuŝa agado. La majstro senkulpigis sin per stulta rimarko: „Hodiaŭ ŝajne ĉio misfunkcias!“

Kiam iu laŭte ekridis, subite la rigardantoj vigliĝis. Kelkaj fajfis, piedoj ritme komencis tamburi la plankon. Magius Ĉaŭdurius, kiu plu sakse dialektumis, provis savi la reprezentadon. Kun oblikva vizaĝesprimo li ĵetis ŝnuron alten en la aeron. Longa drato solviĝis de la ŝnuro kaj falis vibrante sur la plankon.

„Nu, vidu al tio! La ŝnurdratartifiko!“ vokis la dika Popovic moke. La ridado plifortiĝis.

La longa ordigisto sidis ankoraŭ nun tute superflue ĉe la improvizita restoracia vagona tablo. La sorĉista ambiciulo, kiu vidis en li subite enkorpiĝintan savankron, anoncis hektike, ke li nun tiros ormoneron el la nazo de la gasto. Li tiris je la nazo de la longulo kun la kuraĝo de malesperiĝinto. Sed tiu, kiu ne komprenis lin, ofendite ekkriis kaj vehemente vangofrapis la magiiston, antaŭ ol

li fuĝis kun minacanta pugno for de la scenejo. Precipa aplaŭdo akompanis la agadon de la longulo. Ankaŭ la artifiko kun la ŝvebanta kuglo – kiel nun jam ne plu alie antaŭvideblis – tute fiaskiĝis. La kuglo estis nenio krom ruĝa aerbalono, kiu zigzage volis leviĝi en la direkto al la komisiona tablo sur la galerio. Sed iu el la publiko antaŭe per cigaredofajrilo krevigis ĝin. Jubilo kaj aplaŭdo estis la danko por tiu interveno. La skandala sorĉa horo finiĝis per tumulta kriĉado kaj fajfado kaj piedtretado, kiam la sensukcesa Ĉaŭdurius pretendinta esti lerta senkatengisto post dek minutoj elrampis kun pendanta kapo el la granda marista kesto, post kiam li estis doninta frapsignojn por tio. Tri membroj de la ordiga trupo, kiuj post lia eniro en la keston estis saltintaj sur ĝin, dancis en la ritmo de la diskoteka kanto „Ra-ra-rasputin“ kaj kune kantante sur ĝi.

Kiam oni lasis laste fali la kurtenon, por ke la rindinda prezentado finiĝu, leviĝis ankoraŭfoja amasa aplaŭdo, por ellogi la majstron, kiu vere por momento denove per la kapo aperis inter la kurteno. Kelkaj vokis moke: „Majstro, ni amas vin! La magia giganto Magius

Ĉaŭdurius vivu! Li trifoje vivu!“ La plejmulto laŭte ridis kaj aplaŭdegis.

Nur la magia komisiono, la kunlaboranto Hagen kaj kompreneble sinjorino Vesperruĝa ne aplaŭdis. La komisionuloj skuis seninterrompe la kapojn, kvazaŭ ili volis diri, ke tio ne povas esti! Ke tio simple ne eblas! Ke tian ili ankoraŭ neniam travivis! Kulpigaj rigardoj flugis en la direkto al sinjorino Sonja Vesperruĝa, ĉar iu ja devas esti kulpa pri tiu skandalo, se oni devos raporti.

Unu el la kunkulpantoj, Tomas Hagen, kiu antaŭvidis tiun finon, devis kunpremi la dentojn sub la mano, kiun li metis sur sian barbon, por ke li ne laŭte ekridu. Sed kiam li rigardis en la maljunan vizaĝon de la ŝokita ĉefino, kiu nun aspektis dudek jarojn pli olda ol kutime, li hontis iom pri sia malica ĝojo kaj ekpensis kunsente: Kompatinda Sonja! Kompreneblas, ke ŝi estas pleje trafita de tiu hontindaĵo. Neniam ŝi bonŝancas pri la junaj viroj, por kiuj ŝi engaĝas sin kun tia granda energio kaj lerteco. Hagen devis subite pensi pri tio, ke ankaŭ li mem iam estis tia protektato de tiu ino. „Se mi nur povus sorĉi!“ li murmuris ĝemante al si mem. „Se mi povus sorĉi, mi nun

tute rapide forŝorĉus por ŝi tiun malĝojan finon.“

Sed kiel konvinkita materiisto, kiu scias, ke ne eblas vere sorĉi, li forŝteliĝis flanken. Ankaŭ tial, ĉar li ne plu volis vidi la ŝtoniĝintajn ofenditajn vizaĝojn de la komisiono. Estis efektive katastrofo, kiun neniu tiel klare atendis, kvankam mirakloj, kiel ĉiu scias, kutime bezonas iom pli da tempo. Kaj tamen ĝi estis frutempe antaŭdirita de la neŝatata Popovic.

Post tri jaroj Tomas renkontis sinjoron Ĉaŭduri tute hazarde sur trotuaro. Tomas miris, ke li ankoraŭ estas en la urbo. La estinta onta magiisto havis tekon en la mano kaj laboris kiel oficisto ĉe la akvomastrumado. Kun sia ŝtala blua kravato, la blanka ĉemizo kaj la griza longa pantalono li aspektis precize tia, kiaj aspektas ĉiuj, kiuj devas kaŝi sin post griza uniformo en siaj oficejoj, por ke oni ne povu ataki ilin pro tro da individueco. Li estis serioza kaj nervoza kiel ĉiuj tiuj tekosklavoj, kiuj ne havas tempon en la mallonga tagmeza paŭzo.

Kiam Tomas demandis lin, kion li faras krome, se li ne laboras, Giridhar Ĉaŭduri diris seke: „La sorĉadon mi

finis, se vi celas tion, sinjoro Hagen. Mi ankaŭ ne plu elpensas iujn rakontojn. Mi faras nun tion, kion ĉiuj faras, tio estas pli oportuna ol voli esti magiisto.“

Kaj sen eĉ atendi iun respondon, li kapjesis rigidan adiaŭon kaj iris plu.

Tomas postrigardis lin mirigite kaj diris al si mem: „Ĉu tiu ankoraŭ estas la nuboskrapanta Ĉaŭduri? Certe ne. Mi ne scias, sed la frenezulon, la ontan magiiston, mi tamen preferus.“

Tiam li rigardis sur la brakhorloĝon kaj vokis laŭte: „Damne, ankaŭ mi nun devas ekgalopi, la kunsido en la urbodomo komenciĝos post dek minutoj!!!“

Malicaj kristnaskaj anĝeloj

Estis la dua advento, kiam la fraŭlo Leo Sortner travivis ion tre strangan, kio rezultigis ankoraŭ multe pli strangajn okazaĵojn. Okazis ĉe lia reveturo post la kristnaska foriro en la arcmontara urbeto Neĝomonto.

Kiam li lante veturis tra la nebulo sur la glaciigita kaj neĝkovrita vojo per sia ruĝa malnova Citroen 2CV, li subite vidis flugi alte super si du anĝelojn en silkaj nigraj vestoj. Ili havis nigran glatan hararon kaj grandajn blankajn flugilojn. Krome ili tenis ĉenon kun nigraj perloj en la buŝo. Ili flugis unu apud la alia. Ĉiu el ili tenis dekstramane longan poŝlampon, kies konusforma lumo fakte montris la vojon. La frido videble ne ĝenis ilin. Ili turnis la kapojn al la aŭto de Sortner kaj mansalutis lin. La anĝeloj subridis kaj diable rikanis.

La unua penso de sinjoro Sortner estis, ke tio ne povas esti! „Tio estas nur optika fenomeno“, li diris trankvilige al si mem. Sed li ne povis konvinkiĝi pri tio, ĉar la anĝeloj ne malaperis kaj flugis plu sen hasto iom antaŭ li. Li sekvis ilin sur kelkaj montetoj ĝis malsupren en la valon.

Leo Sortner estis mezgranda forta viro, kiu aĝis preskaŭ kvindek jarojn.

Kvankam li estis naskita en Germanio, li aspektis kiel arabo. Lia frunto estis alta, li havis nigran, sed jam iom maldensan hararon, ege indan vizaĝon kaj mentonan barbon, kiu etendiĝis sub la razitaj vangoj ĝis la kaphararo. Per siaj peĉonigraj okuloj li fikse rigardis la anĝelojn. Li ankoraŭ nun ne povis akcepti, kion li vidis. Preskaŭ sian tutan vivon li laboris kiel leterportisto, kaj en tiu tempo li vidis multon, ankaŭ sufiĉe grandan kvanton da frenezuloj. Sed ridantajn flugantajn anĝelojn li vidis ankoraŭ neniam. Sinjoro Sortner ne estis fantaziulo kaj ankaŭ ne adoranto pri esoteraj libroj. Li ne estis ulo, kiu supozas en ĉiu neidentigebla flugobjekto eksterterulon. Tial li certe estis pli ŝokita ol kredanto de mirakloj.

Kiam la trankvile ŝvebantaj anĝeloj atingis la sekvan urbeton kaj subite plirapidiĝis kiel artaj aviadilistoj, ankaŭ Leo Sortner tretis pro scivolo sur la akcelilon. Multe tro rapide li sekvis al la anĝeloj. Kiam li atingis la foirplacon kaj pro la persekuto pretervidis la multajn

policaĵn aŭtojn kaj policanojn, kiuj staris unu apud la alia, li povis preterevidi ilin nur en la lasta momento. Ok policaĵ oficistoj ĉasantaj fuĝantan teroriston el la eksterlando, kiu envenis kiel neleĝa enmigrinto, ĵetiĝis kiel hordo da hundoj de ĉiuj flankoj sur la aĉe aspektantan francan kamparanaŭton de sinjoro Sortner kaj haltigis ĝin. Kelkaj el ili havis pistolon aŭ eĉ mitraleton en la mano. La civitano Sortner estis tiom perpleksa pri tio, ke li ne sukcesis malfermi la riglitajn pordon.

„Eliru! Malfermu! Elaŭtiĝu!“ tondris de ĉiuj flankoj. Al unu el la atakintoj saĝne la reago de Sortner daŭris tro longe, ĉar li senpacience tretis per piedo kontraŭ la pordeton. Tiam ili krude ŝiris sinjoron Sortner el la aŭto. Ĉe tio la ledomonujo de Sortner nerimarkite falis el ties jako en metalan paperkorbon starantan apud la aŭto.

Post kelkaj sekundoj la kaptito jam kuŝis kun la vizaĝo sur la degelita neĝo de la placo, kun la manoj surdorse, katenita per fera oko. Li levis la rigardon kaj vidis super si la subridantajn anĝelojn, kiuj kun malice ĝojaj vizaĝoj alte rondcirklis super la placo. Jen mankas nur la

trompetoj de la arkianĝelo Gabrielo, pensis sinjoro Sortner grumble. Mallaŭte li diris al la policisto, kiu premis piedon en lian flankon: „Ĉu vi ne vidas tie super ni la nigre vestitajn kristnaskajn anĝelojn!“

La policisto, kiu pensis, ke li volas mistifiki lin, ekkriis sen eĉ suprenrigardi: „Okulojn sur la teron! Idioto!“ Ĉe tio li celis per la pistolo sur la kapon de sinjoro Sortner. Tiam oni forkondukis la viron, kiu pretendis esti nenio alia ol tute normala vizitinto de kristnaska foiro en najbara urbo.

En la policejo ili traserĉis liajn poŝojn, forprenis lian havaĵon kaj metis lin en aresttĉelon, kie kutime ebriuloj pasigas la nokton – por devigaj dudek eŭroj. La inventaro de la morna ĉelo konsistis el fera lito kun matraco kaj kovrilo, el necesejositelo kaj lavabo. Por malvarmigi la ŝvelintan maldekstran manartikon per akvo, Sortner malfermis la kranon kaj fride lavis sin. Kiam li denove povis pensi klare, li ĉirkaŭrigardis kaj malkovris ruĝan sonorilbutonon en la ĉelo, kiun li tuj elprovis.

Alarmsonorilo ekŝrikis. Du gapantaj policanoj alvenis kaj kondukis lin en la polican receptejon. Nur nun leŭtenanto

pridemandis lin.

„Kiel vi nomiĝas? Kiam kaj kie naskite? Kie vi havas vian pasporton aŭ alian identigilon? Vian aŭtokondukistan licencon, la paperojn por la aŭto? Aŭ ĉu vi eble tute ne havas ion tian?“

„Ĉio ĉi estas ja en mia ledomonujo en la jakopoŝo“, respondis Leo Sortner kolere, supozante, ke ili erare enĉeligis lin por iu alia.

„Aha, kaj kie do estas via monujo?“ la leŭtenanto demandis kvazaŭ boje.

„Tiun vi ja ne eble ŝtelis de mi?“ elkreve kriis Sortner.

„Bridu vian langon, impertinentulo! Vi vagadas dum semajnoj nekaptite en nia lando, kaj ni – kiuj pro vi havas la tutan spektaklon – ŝtelis vian monujon. Pripensu tion, kion vi diras!“

„Neleĝe? Kial neleĝe? Mi estas naskita en Gera. La monujon mi havis ja en mia jakopoŝo. Ĉu vi ne komprenas tion? Kie aliloke, ĉu? Ĝi devas esti tie, se ĝi ne

elfalis, kiam oni elŝiris min el la aŭto.“

La oficisto, kiu iom miris pri la perfekta turingia dialekto de Sortner, pripensis la aferon kaj tiam elsendis kolegon. Sed tiu trovis neniun monujon sur la placo. La pridemandanto fariĝis nun pli kaj pli laŭta. Sinjoro Sortner pacience ĉion respondis laŭvere kaj eĉ indikis du telefonnumerojn de konatoj. La leŭtenanto ne kredis eĉ vorton el tio. Tiam sinjoro Sortner provis novan taktikon per petegoj, li petegis preskaŭ surgenu, ke oni lin lasu iri hejmen, ke li ne estas tiu, kiun ili serĉas, ke ili bonvolu fine diskigi la numerojn jam delonge indikitajn. La oficiro faris tion, sed neniun respondis.

„Nu do“, li diris nur.

Sinjoro Sortner komencis nun paroli pri la kristnaskaj anĝeloj, kvankam li jam divenis, ke li prefere ne faru tion. La juna leŭtenanto, kiu malamike rigardis lin per sia kvarangula vizaĝo, malŝate demandis: „Kion vi diras? Du mensmalsanaj anĝeloj kun poŝlampoj ŝvebis alte super la foirplaco. Ĉu vi opinias tion serioze?“

Leo Sortner ne respondis, sed ĝemis nur, li komprenis kiel sensencaj devis ŝajni liaj respondoj el la vidpunktoj de la leŭtenanto. Ekde nun li silentis obstine. Tial oni rekondukis lin en la ĉelon.

La polico denunciis lin ĉe la prokuroro pro mankantaj paperoj kaj nepermesita restado en la lando. Oni kondukis lin al la esplorjuĝisto. Post la pridemandado la juĝisto diris seke al li: „Laŭ la evidentaj cirkonstancoj ni bedaŭrinde devos aresti vin por plia esploro dum kelke da tempo.“

„Kion vi diras, bonvolu, ĉu vi intencas enprizonigi min? Ĉu vi freneziĝis, sinjoro?“ demandis ekscitite sinjoro Sortner, kiu tute ne estis sperta pri tiaj aferoj. La esplorjuĝisto, kiu ne moviĝis eĉ per okulharo, senĝenite parolis plu: „Post detala pripensado mi decidis kiel esplora juĝisto, ke ni nepre devas ekzamenigi vin rilate vian mensan staton. La juĝista decido de la unuadistanca tribunalo pri la permeso de via ses-semajna enfermita restado ankoraŭ estos sendita al vi.“

„Kial vi faras tion?“ sinjoro Sortner demandis malespere,

kvazaŭ trafita de klabo.

„Nu, kial do, sinjoro, ĉar vi tute serioze asertas, ke vi vidis du plenkreskajn anĝelojn, kiujn vi sekvis per via aŭto post via vizito de la kristnaska foiro en Neĝomonto. Tion ni ne povas akcepti tiel simple, kiel vi eble imagas tion, sinjoro, ĉar en tiu mondo, kiel ĝenerale estas konate, neniu anĝeloj efektive ekzistas.“ Tion la juĝisto respondis kun sarkasma rideto.

Sinjoron Sortner ĉio ĉi memoris pri inkubo. En la longa veturo per malsanulaŭto, firmpinĉita inter du flegistoj, li eĉ timis, ke oni povus lin pafmortigi ie enarbare, ĉar ili eble volis forigi lin. 'Nu, sed ni ne plu vivas en la faŝismo, ĉu?', li pensis.

Baldaŭ li rajtis eliri el la aŭto, antaŭ longe entendiĝanta dombloko el ruĝaj bakitaj brikoj, kies fenestroj parte estis provizitaj per feraj kradoj.

En la psikiatra kliniko „Kompatema samariano“ oni jam atendis lin. Oni kondukis lin en la fermitan sekcion. Kiam la flegisto fermŝlosis la pordon post li, Sortner pensis

kolere, ke li nun do estas en la frenezulejo! 'Nur pro tio, ĉar mi vidis ion, kio laŭ la la juĝisto ne eblas vidi. Hm. Tiel rapide tio do iras', li pensis timigite.

En la restada ĉambro televidilo montris sur la kanalo Pro 7 kiel du junuloj el la amuza socio insultas sin reciproke esti idioto, porko, mensmalsanulo, patrinfikulo ktp, instigata de rikananta moderatorino, kiu aspektis pro sia frizo kvazaŭ ŝi ĝuste falis el lavmaŝino.

Handikaptito en rulseĝo spasme konvulsie provis rektiĝi, kiam li ekrigardis la novulon Sortner. La flegistino, kiu staris ĉe li, kriis: „For de ĉi tie!“

Li retiriĝis en irejon, en kiu li kunpuŝiĝis kun ŝanceliĝanta oldulo aspektanta kvazaŭ li prenas drogojn. Inoj kun fantomaj vizaĝoj kapjesis letargie al li. Sed unu el il kuris ekscitite tien kaj ĉi tien kaj murmuradis: „Alie mi devos voki la ĉasiston kun la pafilo! Alie mi devas voki la ĉasiston kun la pafilo!“

Fine li atingis la sekcian ĉambron de la flegistaro. Ĝi estis ŝpareme meblita. Cigaretoj kuŝis sur la tablo, kaj kajero

kun la surskribo: „Kiel mi nutru mian hundon!“ Leo Sortner montrofringris al la cigaredoj. Sed tuj iu kriis: „Fingrojn for, he!“

Sinjoro Sortner instinkte kapklinis. Demandite pro lia nomo, li prezentis sin modeste. Tiam oni donis al li certan likvaĵon en glaso. Kiam la efiko ekis, li volis defendi sin kontraŭ la flegistoj, sed li falis baldaŭ en profundan dormon, el kiu li vekigis nur sekvamatene. Kiam li kuŝis ankoraŭ tute dormema en lito, li sentis subite pikantan doloron en la brako. Li aŭdis voĉojn, sed iel li pensis, ke li ankoraŭ sonĝas. Kaj tiam li ekvidis, ke oni prenas sangon de li. Lia buŝo estis seka kaj la lango sen ia percepto. Eĉ lian kombilon, kiun li rajtis reteni ĉe si en la policejo, oni forprenis de li. Ankaŭ lian ne plu funkciantan poŝotelefonon, kiun la policianoj ŝajne pro iu tute nekomprenebla neglekto lasis al li. La flegistoj diris la samon kiel la policianoj: „Ni konservos tion por vi. Kiam vi estos enliberigata, oni redonos ĉion al vi, ne affliktiĝu pri tio, ni ja ne volas prirabi vin.“

Iam pli malfrue ili montris al li la necesejojn kaj la lavĉambrojn. Ĉar li estis devigita enpreni la tablojdojn en

la ĉeesto de la flegistino, li ribelis. Li rifuzis la enprenadon per sia tuta forto. Ju pli oni devigis lin, des pli li kontraŭis tion. La flegistinoj skuis la kapojn kaj eliris. Du fortikaj flegistoj envenis, kaptis lin kaj ĵetis lin sur la liton, kie ili tenis lin kvazaŭ ili volus strangoli lin, sed ili tamen nur rapide puŝis la tablojdojn en lian buŝon, kaj nur tiam liberigis lin, kiam li jam glutis ilin ĉiujn.

Kiam li trankviliĝis post tiu atako, li ĵuris al si, ke li neniam denove protestos kontraŭ la enprenado de tablojdoj – pro timo, ke tiu brutala perforta agado povus ripetiĝi.

La donitaj psikofarmaciaĵoj komencis efiki. Unue li ankoraŭ faris nemotivitajn diablajn grimacojn, movis la langon en la buŝo en ĉiu direkto, sed tio baldaŭ finiĝis. Tiel Sortner iom post iom kutimiĝis la novan situacion.

Por la manĝoj oni vokis lin. Poste li devis ĉiufoje iri al la medikamenta eldonejo. Li ricevis haldolotablojdojn en tiom granda dozo, ke ili faris lin pli kaj pli deprimita kaj pli laca. Post semajno oni metis lin el la granda salono en dulitan ĉambron. Ĉi tie li konatiĝis al Roĉjo, la

civilservanton. Kiam tiu razis lin la unuan fojon, sinjoro Sortner demandis: „Kial cetere mi ne rajtas razi min mem?“

Roĉjo, kies ĝustan nomon neniu sciis, respondis: „Tion ĉi tie devas fari la civiluloj, do ekzemple mi. Vi rajtas fari nenion. Eĉ la suicido ne estas permesita al vi.“ Tiel ili ekbabilis kune. Roĉjo malamegis sian laboron en la „rabia domo“, kiel li nomis la konstruaĵon el ruĝaj brikoj.

„Se mi estus sciinta tion, kio ĉie tie videble estas tute normala, mi prefere estus irinta en la armeon, pro mi eĉ al Irako. Mi devas purviŝi ĉi tie en tiu frenezuldomo por la ridinda salajro de 282 eŭroj monate eĉ la plej kotajn ejojn, kiuj imageblas, kvankam ili permesis al mi softvartistan laborlokon. La sekcia ĉefo estas furiozulino. Ŝi faras la tutan spektaklon ankoraŭ pli neeltenebla ol ĝi jam estus sen ŝi. Ĉi tie malamegas ĉiu ĉiun. Kredu min. Mi plenŝtopas min per medikamentoj, por ke mi transvivu tion.“

Ĉar Sortner aŭskultis lin sen interrompi lian parolfluon, Roĉjo komencis fidi lin iomete kaj eĉ rakontis al li, kiel li

ŝtelis tablojdojn de la pacientoj kaj elprovis ilin, kaj kiel li tial pli malfrue ekhavis ankaŭ la ideon prizorgi al si en la apotekoj la laŭleĝan DXM.

Kiam li ĉe alia fojo aŭskultis de Sortner ties harhirtigan rakonton ĝis la fino, li diris nur: „Estas jam strange, kion vi rakontas, sed vi ne estas la unua, al kiu tio okazis. Sed mi pensas, ke mi povas helpi al vi en tiu okazo. Ni voku telefone pro vi la civilkuraĝulinon Liza de la registrita unuiĝo „FOR DE ĈI TIE!“ Tiuj subtenas enfermitojn kiel vin.“ Ridante li aldonis: „Vi estas pli bonŝanca ol mi, homo! Al mi ĉi tie neniu helpas, min oni devus unue enfermi kiel vin, antaŭ ol iu eble helpus al mi.“

Tiam li fariĝis meditema kaj diris: „Pro la anĝeloj, tio estas vere stranga. Ĉi tie cirkulas onidiroj – kaj eĉ la flegistaro kredas tiujn stultaĵojn. Laŭdire aperas ĉi tie ĉiujare du danĝeraj anĝeloj kun blankajflugiloj, kiuj faras iujn malicaĵojn. En lasta jaro, antaŭ la granda kristnaska festo en la kliniko ili laŭdire staris ĉe la fuĝo de enfermito rikane ĉe la pikdrata barilo, kiam la fuĝanto trafosis sin per ŝpato eksteren. La viro kredis, ke li estas la savonto, kaj ke lia tempo finfine estas veninta, kiel li notis tion en

sia taglibro. Tio tiam havis tragikan finon. Kiam ili ekstere tute ne trovis atenton kaj oni eĉ ridis pri li, li ĵetis sin antaŭ trajnon! Ĵurnalistostudento kolektis la faktojn, aliokaze oni sciis nenion pri tio! Pri tiaj aferoj oni ĉi tie normale ne parolas. Ha jes, preskaŭ mi forgesis la telefonvokon al Liza! Mi tuj faros tion por vi.“

Ŝi venis tuj. La afabla malgranda blonda bonulino aŭskultis atente, kion sinjoro Sortner diris al ŝi kaj ŝi notis tion kaj tion. Ŝi baldaŭ konvinkiĝis, ke li diris la veron, do, ke li vere vidis en sia imago la anĝelojn. Sed tio por ŝi tute ne estis sufiĉa kaŭzo, ke oni forprenu de li la liberon. La energia damo prefere tuj kunprenus lin eksteren. Sed, ĉar tio ne eblis, ŝi minacis la ĉefinon de la kliniko, ke ŝi informos la gazetojn pri tiu skandala traktado de liberaj homoj. Ĉar tiu konis ŝian unuiĝon kaj timis seriozajn sekvojn por si mem, ŝi ordonis, ke oni ekloĝigu sinjoron Sortner provizore kaj neoficiale en la malfermita sekcio. Liza informis la konatojn de sinjoro Sortner pri lia provizora restado, tiuj jam volis publiki serĉanoncon. Krome ŝi telefonis la dikan Kuno en la ofico por trovitaĵoj, kiu estis amiko de ŝi: „Diru foje; Kunĉjo, ĉu

tio povus esti, ke troviĝas ĉe vi la monujo de certa Leo Sortner, kiu estas trovita ĉirkaŭ la dua advento sur la foirplaco?“

La respondo venis tuj: „Efektive, ni havas ĝin, de kie vi scias? Laborprovizito de la laboroficejo trovis ilin ĉe la purigado de la „Placo pri Homaj Rajtoj“ en paperkorbo. Tiu homo devus ricevi ordenon pro lia honesteco. Kvankam li ricevas por tiu laboro de la laboroficejo nur 1,50 eŭrojn po horo aldone, li tamen transdonis la monujon kun ĉiuj paperoj al mi. Kion vi diras pri tia sanktulo? Sed tiel estas, la malriĉuloj estas kutime la plej honestaj. Estas nur domaĝe, ke la nomita Leo Sortner ŝajne ne volas rehavi la aĵojn, kvankam ni skribis al li. Ĉu vi ion scias pri li?“

Liza, kiu ĉion klarigis al Kuno, ege ĝojis pri la informoj. Ŝi iris al la policejo, 'por fini grandan maljustecon kaŭzitan de la polico', kiel ŝi diris al la deĵoranta policano. La oficisto, kiu jam konis ŝin, tuj defendis siajn kolegojn: „Kial vi ĉiam devas enmiksiĝi kiel u-n-u-iĝo, tiun vorton li moke longigis, en tiajn aferojn, ĉu vi scias nenion pli bonan, pri kiu vi povus okupiĝi en via libera tempo?“ li

diris bruske. Sed Liza ne lasis forŝovi sin de li. Ĉar la afero, post telefonvoko ĉe la ofico por trovitaĵoj estis pli ol nur klara, restis al la malafabla oficisto nenio alia krom zorgi por la ĉesigo de la proceso.

Daŭris ankoraŭ certan tempon, ĝis la solena momento venis, kiam Sortner vere estis enliberigata. Li adiaŭis de Roĉjo, kiu ĝojis kun li, kvankam li ankaŭ iom bedaŭris, ke li perdas agrablan interparolkamaradon. Kiam sinjoro Sortner jam staris kun Liza ekstere antaŭ la ruĝa bloko, alte super la urbo, ili rigardis malsupren sur la neĝokovritajn tegmentojn en la valo, kiuj kun la blua ĉielo havis trankviligan efikon al ambaŭ. Li ĝojis, ke la normala vivo denove povos komenciĝi, kaj ŝi estis kontenta, ke ĉio iris tiel rapide kaj glate. Sed kiam li ankoraŭfoje retrorigardis al la enirejo de la kliniko, diskuris horora tremo sur lia haŭto. La du blanke flugilitaj anĝeloj en nigraj vestoj staris tie. Ili svingis salutante permane al li. Unu el ili klakis per la lango kaj poste vulgare lekis la lipojn. La alia subridis kiel frenezulo kaj frapis ĉe tio per la montrofigro sur grandan ŝildon, sur kiu legeblis:

ĜOJAN KRISTNASKON, FRENEZULO!

Sinjoro Sortner ekkaptis manon de Liza kaj signis per mieno tute pale al la pordego. Kiam Liza ektimigite turnis tien, la frenezaj nigre vestitaj kristnaskaj anĝeloj jam denove estis malaperintaj. Eĉ Leo Sortner denove dubis, ĉu la anĝeloj ekzistas vere nur en lia fantazio. Kaj se ili vere ne ekzistas, kial ekzistas tiuj onidiroj pri ili? Sortner ne sciis respondon.

Kiam li eniris en la arĝente grizan Peugeot de Liza, li ankoraŭfoje firme enspiris la freŝan vintran aeron kaj poste bruligis cigaredon, kiun Liza kunhavis por li, kvankam ŝi mem tute ne ŝatas la fumadon. Sinjoro Sortner ne sciis kiel adiaŭi de Liza, li rompis al si la kapon, kio estus inda kaj kio ne. Fine li aludis, ke li ĝojus, se ŝi veturus lin al la policejo, poste eble eĉ hejmen, kio dependus de tio, ĉu li ricevus la aŭton, ĉu ne. Sed Liza, la protektanta anĝelo el karno kaj sango, startante la motoron, kontraŭdiris firme: „Ne, ne, Leo, tiel rapide vi ne hejmeniĝos. Ni ja nur nun vere komencas reordigi ĉion. Unue ni devas iri al kuracisto, kiu estas je nia flanko, por havi ateston pri via sanstato, tiam ni iros al la policejo, pro via amuza ruĝa aŭto. Mi estas scivola, kie la

kruduloj havas ĝin, kaj ĉu ili jam riparis la aŭton. Eble ili devos pagi por la kaputa pordo, aŭ ni denuncos ilin pro misuzo de ilia aŭtoritato.“

Tiam ŝi hezitis momenton, oblikve rigardis lin kaj aldonis: „Kaj se vi emas, ni festos kune vian sukceson kaj Kristnaskon en mia dometo, en la hejtita vintroĝardeno, kun la aliaj helpantoj el nia unuiĝo, ĉu konsentite?“

Leo Sortner estis kortuŝita. Subite, post ĉiuj tiuj strangaj okazaĵoj, liaj okuloj fariĝis malsekaj. Li estis tre emociita. Dum momento li vidis Lizan en siaj pensoj kiel inan Jesuon kun ora aŭreolo. Tio eĉ pli embarasigis lin. Tial li nur kapjesis kaj turnis kun honta sento la kapon flanken.'

Admirinda Liza', li pensis. 'Ĉu mi estus por ĉiam tie, se ŝi ne helpus al mi? Ĉu mi havus la forton liberigi min mem sen solidara helpo? De kie ŝi prenas nur sian forton, tion mi volus scii.'

Mikskvalita brando

Kiel kvinjara bubo kun blondega hararo, kiu ĉiutage malkovris novajn miraklojn, mi ankoraŭ loĝis ĉe mia avino en la vilaĝeto Sachsenroda proksime de Lumpzig en la tiama distrikto Gera en la Germana Respubliko Germanio. Tie mi faris multajn stultaĵojn, sed ne pli da ili ol la Buŝ-buboj Maks kaj Moric kune.

Unu el tiuj stultaĵoj estis la sekva: En la bruna vitrino de mia avino en la loĝoĉambro staris multaj interesaj glasoĵoj kaj ceramikaĵoj, sed plej min interesis la botelo kun la mikskvalita brando, kiu estis mezgranda.

La botelo min fascinis pro la interesa koloroludoj. Ĝi plej logis min. Ĉar ĝi havis orkoloran ŝraŭbkovrilon, mi ne povis deteni min de tio provi malfermŝraubi ĝin kaj gustumi la enhavon. Mi do prenis ovoforman malhelan likvorglaseton kun ora supra rando (tian kian mi ankoraŭ nun havas kiel memoraĵon pri mia kara avino en la loĝoĉambra vitrino de la murŝrankaro).

Mi enverŝis iom de la trinkaĵo, gustumis kaj estis surprizita, ke la likvoro gustas tiel bone. Neniu komparo

al biero, vere ne. Tio estis tiam nur aĉa amara trinkaĵo por mi. (Kial trinkis ĝin mia patro, estis enigmo por mi). „Hehe, tiu likvoro vere bongustas“, mi pensis tiumomente. (Mi supozis, ke estas likvoro, kvankam estis brandomiksaĵo.)

Mi rigardis unue, kie troviĝas avinjo, kaj ĉar ŝi staris kun forko en la porkostalo apud alia parto de la domo, mi trinkis rapide la enhavon de plia glaseto. „Hm, hehe, bonege!“ mi diris entuziasme. Miaj oreloj eĉ ruĝiĝis pro ekscitiĝo.

Sed tiam kaptis min subite granda timo. Mi ekkonsciiĝis pri mia krima ago. „Ho ve, se ŝi rimarkos tion, mi estos finita.“ Tiam ŝi tordos miajn orelojn tiom, ke el mi fariĝos azeno por ĉiam.“

Kvankam mi preskaŭ klakadis per la dentoj pro timo, ŝi rimarkis tamen nenion.

Evidente ne nur la vitrino de avino estis sanktaĵo, sed ŝajne ankaŭ la brandobotelo mem, kiu staris evidente netuŝita jam dum eternecoj.

Tial mi nun trinkis en la kuro de semajno, ĉiufoje ŝtelirante kiel sovaĝa kato, ĉiutage kun ĝuo glasetan enhavon de la mikskvalita brando. Ĉar la botelo estis sufiĉe malhela, avino rimarkis ankoraŭ nun nenion. Kaj kiam mi fine post kelkaj tagoj estis tute eltrinkinta la botelon, mi ekcerbumis kion fari?

Denove mia koro ekbatis kiel freneze. Se ŝi eltrovos tion, mi estas finita por ĉiam, mi denove pensis. Tiam la batoj tion hajlos sur min, ke mi aspektos blua kaj verda kiel marsvirineto.

Du tagojn mi vivis kun granda timo, ĉar mi ne trovis solvon por la problemo. Sed poste mi havis grandiozan ideon: Mi simple plenigis la botelon per akvo, kiun mi iom kolorigis per bruna ovokoloro. Tio aspektis sufiĉe originala – mi pensis. Mi estis vere fiera pri mia eltrovo.

Kaj tiam mi iom post iom forgesis la maltrankviligan aferon.

Post monatoj, kiam mia avino havis sian naskiĝtagon, kaj kiam ni sidis ĉiuj kiel orgenaj fajfiloj ĉe la kukotablo, diris

mia avino subite al la gastoj: „Nu, karaj, jen mi havas ankoraŭ ion tre bonan, bonegan brandeton mikskvalitan por vi, tio estas „bongustaĵo, vi lekos ĉiujn fingrojn post la trinkado!“ Kaj tiam ŝi diris ankoraŭ markonomon, kiun mi forgesis.

Mi fariĝis morte pala en la vizaĝo. Sed eltrinkita estas eltrinkita, tio jam ne plu ŝanĝeblis. Granda fulmotondro estis proksimiĝanta, mi vidis jam la fulmojn el nigraj nuboj rekte super mi. Mi entiris la kapon, rigardis unue kiel timema birdeto en ĉiu direkto kaj fine strabis al la avino.

Ŝi iris al la vitrino, rigardis la botelon, iom hezitis, rigardis denove, frotadis la okulojn kaj ankoraŭfoje rigardadis. Trinkinte fine iomete de la supozata brandomiksaĵo, ŝi laŭte elkriis kiel furio: „Tiu damnito, tiu krimulo, tiu kanajlo, tiu bandito, li ne hontis ŝteli eĉ la miksbrandon en la vitrino de ni!“

Ŝi parolis pri mia patro, kiu jam kiel drinkulo estis reveninta el la milito, kaj kiu laŭdire iam ŝtelis eĉ monon de mia avino.

Kiel filmprezentadisto en la kamparo li eltrinkis dum ĉiu prezentado tutan keston da biero. Li vivis tiam jam dum monatoj ne plu ĉe ni, sed ĉe sia patrino en la granda postsepmonta urbo Gera.

En tiu momento mi estis vere tre dankema al mia patro, ke li kiel polvosuĉilo transprenis la tutan fulmotondron por la fatala afero, kiu ankaŭ tial tiom afliktis mian infanan animon, ĉar mi ne volis seniluziigi mian karan avinon, kiu tion neniel meritis.

Kiam ĉiuj malbenis la patron kaj diris, ke tio estas tipa por tiu drinkulo kaj arcfripono, kiu alportis nenion krom malfeliĉon al la kara familio, mi sidis tute silente en la angulo kaj pensis,, ke mi nun plej volonte estus museto en la proksimo de musotruo, por ke mi tuj povu forkuri tra ĝi, se mia fiago tamen ankoraŭ konatiĝos.

Sed neniam iu rimarkis ion, kaj kiam mi rakontis la aferon al mia avino, en tempo, kiam ni jam ĉiuj kune vivis en la urbo Altenburg, ŝi iom perpleksiĝis kaj diris: „Tio estis vi? Vin mi vere ne suspektis, nekredeble!“ Ŝi ridetis kaj diris ankoraŭ, ke Karl, mia patro estis tamen kanajlo,

kaj ke ŝi tial tamen tute rajtigite havis la supozon, ke li kulpis tion. Min ŝi tute senkulpigis per tio, ke ŝi pardoneme diris: „Tiam vi ankoraŭ estis tre scivolema bubea infaneto, kaj tiaj knaboj simple faras tiajn stultaĵojn. Tio ja ne estis la ununura stultaĵo, kiun vi entreprenis tiam.“ Kaj ĉe tio ŝi ridetis tiel moke kaj elkore, ke mi sentis min subite tute malŝarĝita de tiu afereto, kiu ankoraŭ post jaroj vekis malgrablajn sentojn en mi.

Pri viro, kiu forgesis sin

Survoje, kiam li forgesis sin, li venis en urbon, kiu nomiĝis: Esperantoburger.

Sur la foirplaco ili ĝuste starigis budojn kaj benkojn, kaj biertendon. Laŭtparoliloj muĝis, karuselo turniĝis. Fortikulo montris siajn muskolojn. Sur la scenejo knabina ĥoro ekzercis laŭdokanton por la plenumkomitato de Esperantoburger.

Svelta viro, kiu aspektis kiel generalo Trotski en batalo, sabris per sia direktilo la aeron. Poste deklamis iu gravulo kun bunta kravato paroladon sur la tribuno.

La viro aĉetis glason da biero kaj bulkon kun acidaj haringoj kaj haltis ĉe ronda tablo. De tie li legis la grandliteran rubandon sur la scenejo:

„VIVU LA CEZARO!

VIVU ESPERANTOBURGER!

VIVU ESPERANTO!“

La viro pensis: Dio mia, ĉe Sankta Virgulino kaj ĉiuj

sanktuloj, tiu Cezar kun la aldona vokalo o ja ne eble estas mi mem, ĉu? Li devis ekridi, ĉar li trovis tion superba ŝerco.

Li demandis inon volupte aspektantan, kiu estis vestita kiel rajdistino: „Kial tiu spektaklo, bela rajdistino? Pri kio temas, belulino? Kiun imperatoron vi ĝuste festas? La diktatoron kun la numero 2015 aŭ nur tiun kun numero 2014? Aŭ ĉu vi trovis tute novspecan heroon. Kio prepariĝas tie?“

Ŝi ridetis milde kaj diris: „Tion ĝuste demandas vi? Iomete stranga tio ja estas, sinjoro mia. Ĉu vi ne estas tiu Cezaro? Ĉu vi ne ĝuste diris tion?“

„Mi diris nur, ke mi estas Cezar, aŭ sinjoro Bluo, tiel, kiel vi volas.“

Kaj alia viro, kiu asertis esti la ĉefredaktoro de la plej grava literaturgazeto, kiu iam ajn ekzistis en la civilizita mondo, diris nun kun rikana vizaĝo: „Sinjoro Bluo, kiel mi diru tion ĝentile al vi? La tuta spektaklo temas simple pri kompatinda viro, kiu tute forgesis sin. Tio okazas

ofte.“

„Viro, kiu tute forgesis sin, ĉu?“ diris iom surprizite la naivema sinjoro Bluo.

Sed tiam li subite ekkomprenis. Tiu viro estas efektive mi mem, li pensis. Mi estas la viro, kiu tute forgesis sin.

„Dankon, ke vi atentigis min, kara sinjoro, vi pravas, homoj povas rapide forgesi sin.“

Ankoraŭ nun sinjoro Bluo gapis konsternite. Li tute ne plu rikanis, eĉ ne ridetis. Hm, mi estas do la viro, kiu forgesis sin, li pensis, tio trafas eble la kernon de la afero! Tia mi ja estas! La redaktoro pravas.

Poste li rompis al si la kapon, kion li devos ŝanĝi en sia vivo. Sed al iu vere kontentiga rezulto li ankaŭ ĉifoje ne venis. Li serĉis specon de savankro, iun fuĝvojon al nova espero, iun bluan pardonon en la griza subĉielo, iun novan utopion en la malproksima horizonto. Sed li ne trovis ion vere taŭgan, ĉar li jam sciis, ke tio tiel facila ne estas.

Finfine li diris al si: „Kion fari? Ankoraŭ mi ja vivas, ĉu ne? Mi do iros plu. Kiel kutime, kiel mi faras tion jam dum multaj jaroj. Ion pli bonan ol la morton mi trovos en ĉiu kazo.“

Li prenis sian ioman havaĵon kaj ekmarŝis en aliajn urbojn, en aliajn landojn, en aliajn mondojn. Sed kien ajn li venis, tuj iu gardisto ekvokis: „Jen vidu al tiu fremdulo, al tiu paradizbirdo kaj senhejma vagabondo. Li estas tute certe aroganta kaj orgojla. Vidu tiun impertinentan vizaĝon. Gardu vin kontraŭ tiaj! Ne sekvu lian malbonan ekzemplon. Li estas la viro, kiu forgesis sin!“

ESEOJ de CEZAR

Absoluta kaj relativa veroj

Breivik kaj ni

Ĉu Esperanto estas afero por morgaŭ?

Ĉu junaj viroj estas la plej grandaj egoistoj?

Dancanta akvoguto

Eĉ tombejaj anĝeloj revas

Esperanto plej taŭgas kiel interlingvo

Frida nia

Kio vi pensas pri Esperanto kaj ties estonteco?

La feliĉo

La fendo de l' mondo

La revoluciulo Jesuo Kristo

Nia matrjoŝko kaj la rusa-germana amikeco

Pieter Brueghel: La triumfo de l' morto

Pri kosmopolitismo

Spiralo de perforto

Absoluta kaj relativa veroj

(la vetkuro kontraŭ ni)

Al mi jam sufiĉas relativaj veroj. Ke la planedo tero pli similas al kuglo ol al disko estas tia relativa vero. La absolutan veron pri ĉio konus nur Dio, se tiu ekzistus, kion mi ne povas imagi.

Ni, la homoj, povas nur proksimiĝi al la absoluta vero pri ĉio, helpe de relativaj veroj. Ju pli ni scias des pli ni proksimiĝas al la absoluta vero.

Alternativaj veroj aŭ malveroj estas speciala kazo de la sciado. Se oni demandas min ĉu mi estas viro aŭ ino, mi povas diri eĉ absolute vere, ke mi estas viro. En tiu senco ekzistas amasoj de absolutaj veroj. Sed mi nomas tion banalaj absolutaj veroj. Se oni demandas min, ĉu mi estas Cezar aŭ Napoleono, mi devas diri, ke mi estas Cezar, aŭ pli ĝuste Hans-Georg Kaiser el Altenburgo, Germanio, loĝanta tie en certa strato. Nu, tio estas tre banala vero, ĉu ne?

Do, konklude ni ne scias la absolutan veron pri ĉio, sed nur relativajn verojn, kaj tion pli bone aŭ pli malbone. Ideale estas, se ni pli kaj pli proksimiĝas al la absoluta vero pri ĉio; tion faras la homaro dekomence ĝis nun. Sed ni kunpensu, ke ankaŭ la absoluta vero estas ne fiksa punkto en universa spiralnebullo, sed vero, kiu moviĝas tiel kiel ni. Tio, kio hodiaŭ estas absolute vera jam morgaŭ eble ne plu estos vero, sed tute malvera. Eĉ la absoluta vero pri ĉio ne estas ĉiam la sama. Ni estas kvazaŭ en vetkuro kun la absoluta vero, kiam ni trovis relativan veron, la absoluta vero jam denove iom ŝanĝiĝis, moviĝis kaj moviĝas plu al novaj relativaj punktoj. La absoluta vero estas kvazaŭ la erinaco, kaj ni estas la leporoj, kiuj pensas, ke ni povas superruzi la absolutan veron, ĉar ni estas pli rapidaj ol ĝi. Sed ne, ĝi ĉiam denove fuĝas de ni kiel timida kapreolo, kiom ajn ni eble proksimiĝas ĝin. Evidente la absoluta vero volas esti por si mem, ĝi ne toleras, ke ni eniras en ĝian regnon. En tiu senco ĝi estas netuŝebla. Ni do konsciu, ke ni neniam scios ĉion, sed relative pli ol nun certe.

Breivik kaj ni

Ĉu iu registaro iam diris, ke la ĉefo de Usono estis frenezulo, ĉar li ordonis ĵeti atombombojn sur Hiroŝimon kaj Nagasaki kaj murdigis per tio centmilojn de homoj? Certe ne. Do, la problemo unuavice ne estas Breivik, sed la registaroj, kiuj trovas tion en ordo, murdi homojn por la propraj celoj. Breivik faris nur la saman. En certa senco do eĉ "kompreneblas", ĉar li „prenis al si la rajton“ murdi aliajn. Tion tiel faras tutaj registaroj, kaj jam kiel infano oni lernas kiel murdi homojn sur komputilludoj ktp.... Tial estas nur giganta hipokriteco, se oni nun asertas, ke Breivik estas freneza, sed registaroj, kiuj faras la saman, ne. Breivik agis tute laŭtempe, kaj ne male al la nuna kutima logiko, kiu regas preskaŭ ĉiujn. Murdu kaj vivu aŭ ne murdu kaj mortu. Sed jam Jesuo, la fikcia dio-filo avertis, ke tiu pereos per la glavo, kiu elingigas ĝin.

Sed tamen tiaj, kiaj mi, kiuj postulas pacon en la mondo, estas rigardataj kiel kompatindaj naivaj idiotoj. Jen la vero! Kaj tiuj, kiuj ekzemple asertas esti kristanoj, kaj samtempe murdas homojn, fieras eĉ pri tio. Kaj registaroj permesas la vendadon de armiloj por tiaj fiaj celoj, ankaŭ

por tio, ke aliaj murdu sin reciproke. (Se du murdas sin reciproke, jen ĝojas tria!)

Sed kial registaroj permesas la vendadon de armiloj? Jen la kulmino de hipokriteco: laŭdire por ke la laboristoj de armilfabrikoj ne perdu sian laboron; ĉu tio estas la logiko de freneza cerbo ĉu ne? Mi pensas, ke jes, ĉar ĉiu milito, ĉiu murdo malproksimigas nin iom pli de la celo vivi kiel homaro pace kune, kvankam tio estus la bazo por tio, ke ni transvivos kiel homaro en la kosmo.

Sed honeste dirate: niaj ŝancoj momente estas tre malbonaj, tial ankaŭ frenezuloj tiam kiaj Breivik ekzistas kaj estas eĉ amaskomunikilaj supersteluloj, pri kiuj diskutas la tuta mondo. Ni vivas en freneziga mondo, kaj tial ekzistas milionoj de homoj sur nia bela planedo Tero, kiuj pensas kaj agas tiel, kiel Breivik, ĉar oni faris militobotojn el ili, adorantojn de armiloj kaj adorantojn de murdistoj.

La fama Orwell jam klarpense priskribis en sia fama verko "1984" tion, kion ni nun travivas. Ni preskaŭ ĉiuj fariĝis duoblopensuloj (*doublethinker*). Multaj volas havi

pacon kaj militon samtempe, sed tio ne eblas, aŭ mondo de militistoj aŭ mondo de paco, alian elekton ni ne havas, tria eblo ne ekzistas. Por ŝanĝi la mondon, ni devus ŝanĝi la pensdirekton. Per klaboroj kaj bomboj en niaj kapoj kaj en la reala mondo ni ne atingos la pacon. Tiukaze ni eĉ ne transvivus longe, ĉar ĉio, kio estas bona surtere, estas paca. Kaj se la homaro tion finfine tamen ne ekkomprenos, ĝi estos nur tre mallongtempa, sed giganta mutacio kaj aberacio de la "normala vivo" en la kosmo, kiu ja estas eterne kontraŭdira proceso kaj batalo, sed en la kadro de ĉiama granda harmonio.

Ĉu Esperanto estas afero por morgaŭ?

Iam ankaŭ mi estis tiel naiva pensi, ke Esperanto estas afero por morgaŭ. Sed, se ni ne NUN kaj TUJ laboras por la bona afero Esperanto, kiam do? Kiam ni estos mortaj? Nu, tio certe ne estus bona momento. Ni devas NUN fari kaj NUN montri niajn dentojn al aĉa ignorema mondo, kiu ne bezonas papiliojn kaj ne homindan socian ordon aŭ internacian lingvon, mondo, kiu ne bezonas belon, progreson kaj homaran grandon. Kiam ni estos mortaj, estos tro malfrue por tiaj aferoj.

Esperanto estas kiel bela papilio, oni devas flegi tiun delikatan estaĵon, kiu ĵus komencas flugi. Se ne ni faras tion, kiu do por ni? Mi devas fari, kaj tiukaze eble faros ankaŭ aliaj ion por Esperanto. Ĉiam devas esti antaŭirantoj, pioniroj, ĉarkondukistoj, avanculoj, homaraj herooj, plu-irantoj, rompantoj de feraj leĝoj; se tiaj ne estus, se ne estus aventuristoj, esploristoj, Einsteinuloj, homoj kun larĝaj ŝultroj, kiuj kun maĉeto hakas vojon tra la ĝangalo, jen ne estus progreso, jen vojaĝus neniuj Kolumboj de bordo al bordo, de kontinento al kontinento, de planedo al planedo... Ĉiu

homo gravas, ĉiu havas sian taskon, ekzemple kiel esperantisto.

Esperanto ne estas afero por morgaŭ, sed afero por kiu niaj antaŭuloj jam laboris dum pli ol cent tridek jaroj. Tiuj, kiuj sentas la neceson interne, havas la devon NUN kaj JAM HODIAŬ labori por Esperanto, morgaŭ eble jam estos tro malfrue por tio. Per vento kaj vanto ni ne atingos la celon en gloro, sed nur per memdediĉa ĉiama laboro por Esperanto. Kaj tiu laboro estas unuavice paclaboro de esperantoj.

Ĉu junaj viroj estas la plej grandaj egoistoj?

Junaj viroj estas la plej grandaj egoistoj – tion almenaŭ asertas nova studo, kiun publikis sciencistoj de la universitatoj de Jena, Mannheim kaj Innsbruck, Eksperimento kun semajna gazeto laŭ ili pruvis, ke virinoj aŭ pli aĝaj homoj malpli pensas pri la propra avantaĝo ol junaj viroj. Tion ĉi-merkrede klarigis Carsten Schmidt, ekonomia sciencisto. Li koncedas ke certa grupo, kiu estas eĉ pli egoista, mankas en la studo. Certe la vero, sed kiun tavolon li efektive celis: tute surprizige la infanetojn. Tiuj estas laŭ li eĉ pli egoistaj.

Kompreneble tio estas absurda, kiel oni povas nomi infanon egoista? Tion povas diri nur profesoro, kiu ankoraŭ neniam rigardis infaneton dormanta en sia lito aŭ ludanta kun serioza vizaĝo en koridoro aŭ en ĝardeno. Kompreneble infanoj ne estas egoistoj, tute alie, ili estas pro neceso egocentraj, kaj tio kunrajtigiteco, ĉar ili tute dependas de siaj gepatroj, kaj tamen ili estas ege honestaj, ili ne jam hipokritas, montras siajn aŭtentikajn sentojn, ĉu ili ridas ĉu ploras.

La studo estas tia studo por montri, ke la plej multaj studoj universitataj disponigas plu nur dezirrezultojn, do tiujn rezultojn, kiujn oportunistaj sciencistoj devas liveri, por ke ili ne perdu sian reputacion en tiu klaso, kiu plej subvencias ilin.

Churchill, la sprita brita ŝtatestro, laŭdire asertis, ke li fidis nur al tiuj statistikoj, kiujn li mem falsis, sed jam tio estas mensogo, ĉar la frazo en vero estas diraĵo de la germana propagandoministro Goebbels, kiu volis endubigi la statistikajn nombrojn, kiujn Churchill en gazetoj kaj en radioelsendaĵoj daŭre publikigis, kiam la marbatalo jam ne plu gajneblis fare de la germanoj.

Sed reen al la egoistaj junaj viroj. Kiuj viroj tiuj estas, kiuj legas semajnan gazeton? Tio estas plej ofte la infanoj de bonstastaj familioj, kiuj povas permesi al si la lukson legi semajnan gazeton, junuloj de malbone pagataj laboristoj aŭ oficistoj kutime ne povas permesi tian lukson al si. Krome multaj junaj viroj ne plu legas gazetojn, ili uzas por tio prefere la interreton, ili ludas dum multaj horoj per komputiloj aŭ preferas aĉeti por sia mono statindikajn markovestojn... krome ili pli interesiĝas por

junaj damoj ol por la babilaĉo en tielnomataj liberalaj kaj konservativaj gazetoj. Kaj se ili tamen legas semajnajn gazetojn, jen plej ofte tiujn de siaj tre bonstataj gepatroj. Tio montras jam la ĝustan direkton.

Kiu do estas la plej egoista tavolo en ĉiu popolo? Kompreneble tiu tavolo, kiu havas la plej multan disponeblan privatan monon en bankoj, la riĉuloj ĉiuŝpecaj. Kiuj tiuj estas? Bone divenite! La ĉefoj kaj manaĝeroj de la grandaj konzernoj kaj similaj honorinduloj el la politiko aŭ de eklezioj. Al ili nuntempe apartenas eĉ diversaj artistoj, krome spekulantoj kaj la ĉefoj en la plej supraj etaĝoj de novaj firmaoj, kiuj pro la industria revolucio kiel fungoj kreskis el la tero por poste konkeri tute novajn industribranĉojn, ni pensu nur pri Mikrosofto aŭ Guglo.

Jen do personoj kaj individuoj, kiuj povas permesi al si la lukson aĉeti anonime iun novan van Gogh aŭ ekz. laŭ aktuala sciigo iun Rothko-pentraĵo por 73 milonoj da dolaroj, nur por poste kaŝi tiajn bildojn en tresoro en kelo de moderna fortikaĵo nomata: mia domo. Por ke la valoro de la bildo tie per si mem plu kresku kiel orotrezoroj en

fabeloj.

Do, kiuj estas la plej grandaj egoistoj? Ĉu tio estas la junaj viroj, kiuj dependas de siaj riĉaj aŭ malriĉaj gepatroj aŭ estas la milionuloj, la miliarduloj, kiuj apartenas al la reganta ekonomia klaso en preskaŭ ĉiuj landoj de la tero? Jen la milionuloj kaj miliarduloj koste de tiuj, kiuj milionope devas malsatmorti aŭ miliardope vivi en ekstreme aĉa vivnivelo, por ke tia riĉa klaso povu vivi en tia eksterordinara lukso? Al kiom da malriĉaj homoj oni povus helpi, se la Rothko-pentraĵo „*White Center*“ kun tiu hororiga sumo ne ekzistus? Kiom da egoismo necesas, por ke tamen iu aĉetas tian pentraĵon, kies artista valoro estas nulo? Pripensu tion mem, kara leganto.

Por tiuj, kiuj nun elkrias, ke mia artikolo nutras nur la envion, kaj ke la envio estas unu el la plej grandaj pekoj penseblaj, mi aldonu, ke tion ĝuste asertas tiuj malnovaj kaj novaj riĉuloj, pri kiuj mi skribis. Kaj kial? Nu, ree pripensu foje mem...

Jen mia respondo: Por ke, tiuj, kiuj jam havas tro multe, ricevu la cendojn de la povruloj helpe de la eklezioj kaj

karitataj organizoj ankoraŭ aldone. Kiel nun ekzemple per nova ruza truko la bankoj, kiuj nun subite ĉiuj estas bankrotaj, por ke oni helpu al ili.

Dancanta akvoguto

(pri memakvarelo)

Min vizitis iam dancanta akvoguto, kiu iam falis sur mian akvarelfolion. Ŝajne intence, por montri al mi kaj al ni ĉiuj kiel fantasta kaj fantaziplena estas la mondo. Mi ne devis pentri ĝin, tion la guto faris mem, ĉar ĝi saltis en la ĝusta momento sur la ĝustan lokon de la malseka folio. Mi ne devis fari multon por krei unikan akvarelon: mi nur aldonis lupeon, la akvopunktetojn kaj la kadron al la dancanta akvoguto. Tiel la efemera akvoguto kvazaŭ eterniĝis en la arto. Tio vere ne estas ĉiutaga, ĉu ne?

La akvoguto eternigita havas enorman simbolan signifon: se eĉ akvoguto dancas sur akvarelfolio, aŭ se Leonardo da Vinci desegnis la biciklon eĉ kun la ĝusta dentrada aparaturo ĉirkaŭ 400 jarojn antaŭ la produktado de la unua biciklo, fakte nenio maleblas en la mondo. Oni tute troigas la devigon per la sorto aŭ per fatale deviga ekonomio laŭ Marx. La vivo estas antaŭ ĉio nekredebla hazardo, ne la sekvo de iu neevitebla neceso, sed en certa senco universa miraklo. Kaj ankaŭ la arto estas antaŭ ĉio

hazardo, ĝi tute dependas de hazardoj kaj de unikaj homoj, kiuj kreas la unikan artverkon iam en unika momento. Se ne estus individuoj kaj hazardoj, ne estus arto. Do, ĉiu el ni, ĉar ni ĉiuj estas unikaj kiel folioj je arbo, tre gravas, ĉiu povas krei grandan, se li fidus pri si, se li permesas arton, unikecon en si kaj ĉe si.

Eĉ tombejaj anĝeloj revas

La bildon kun du revantaj anĝelo mi fotis en vilaĝa tombejo apud Gmandstein, kiun mi ofte vizitas kun mia edzino per aŭto aŭ surbicikle en nia regiono apud Kohren-Sahlis kaj Gmandstein. Mi konscias, ke tiu foto estas sufiĉe kiĉa foto, sed tio estis ja mia intenco, mi konfesas (sed ne diru plu al iu:), ke mi estas ŝatanto de kortuŝa kiĉo:). Tion mi havas komune kun iama amikino de Kafka, kiel ŝi nomiĝis, ĉu Jarmila? Ŝi skribis eĉ belan artikolon pri la temo.

Ĉu oni ne miru pri revantaj anĝeloj en tombejo? Ili estas serenaj. Pri kio ili revas tiel dolĉe? Kiujn dezirojn li havas?

En la vizaĝo de la anĝeloj mi ekvidas la trankvilon, kiu atendas nin, kiam ni iam estos mortaj. La morto ne estas io malbona, sed eterna paco. Antaŭe oni plej ofte nur baraktas sin tra la vivo kaj ĉagreniĝas pri la multaj homoj, kiuj disipas sian tempon por oro kaj gloro, por sereno ili devus batali, ĉu? La vivo estas maltrankvila afero per si mem, tio ne ŝanĝeblas, sed serenaj ni povus tamen esti,

serenaj kaj iom pli saĝaj ol kutime, ĉu?

Krome la morto laŭ Epikuro tute ne koncernas nin, kiam ni vivas. Kaj se ni estas mortaj, ni ja ne plu vivos kaj do jam ne povos ĉagreni nin pri tio, ke ni estas jam mortaj, ĉu? Pri la migrado de animoj mi ne fidas, nia pensado estas ligita al nia cerbo kaj eventuale al aliaj korpopartoj, poste nia animo troviĝos nur plu en libroj aŭ en la interreto, se ni havis ion por diri, kiam ni ankoraŭ vivis. Tiaj animmigradoj mi kompreneble akceptas. Kelkaj mortintoj vivas pli longe.

Mia konsilo: Iru foje al bela tombejo kaj ĝuu la trankvilecon tie, tombejoj ne estas mortaj lokoj, tie estas la naturo, la arboj, birdoj, pensemaj homoj, kiu honoras per belaj floroj siajn mortintojn. Eĉj serenaj anĝeloj kuŝas sur la tomboj kaj revas pri io... ripozu iom en tombejo kaj tiam reiru al la vivantoj, kiuj ofte estas nur eternaj dormantoj, ĉar ili preteriras la belojn de l' mondo pro tro klinita kapo. Do, lasu vin vekigi kaj rektigi de tombejo, se vi jam divenas, ke vi nur preterdormas la vivon, la vivon, kiu ne penseblas sen la morto, do trovu vin eble tie, se vi ankoraŭ serĉas vian memon per grandigaj vitroj – eble la

tombejo vekigos vin el via friduja dormo aŭ el via troigita
malespero!

Via vojkamarado Cezar!

Esperanto plej taŭgas kiel interlingvo

Min ĉiam denove ravas, ke Esperanto estas la plej bone funkcianta lingvo inter diversaj lingvanoj . Mi lernis la anglan dum sufiĉe longa tempo, unue en lernejo kaj poste aŭtodidakte, sed mi neniam kapablis paroli senerare angle aŭ usone, en Esperanto tio grandskale eblas, ĉar Esperanto estas senbalastigita de amaso da lingvaj arbitraĵoj kaj sensencaĵoj.

Anglaj interparoladoj de homoj, kies gepatra lingvo estas iu alia ol la angla aŭ usona estas plej ofte nur balbutado, sed se esperantistoj interparolas, ili kutime jam post tri monatoj aŭ eĉ pli frue ne devas plu "balbutadi" kune.

Tial tute rajtigite oni povas diri, ke Esperanto estas ne nur plenfunkcia, sed ankaŭ, kaj tio estas eĉ pli grava por mi, la plej bone funkcianta lingvo inter homoj el diversaj lingvaj komunumoj.

Esperanto eble neniam anstataŭos aliajn lingvojn tute, sed tute certe ĝi iam anstataŭos la anglan kiel plej gravan lingvan interkomunikilon, simple tial, ĉar ĝi estas pli

simple lernebla kaj uzebla ol la imperiaj angla aŭ usona.

Cetere, se mortas imperio ankaŭ ties lingvo iom post iom mortas. Sed la homara lingvo ne estos imperia lingvo.

Frida nia

Por ni, Donjo kaj mi, Frida Kahlo ne bezonas la centjaran datrevenon, por ke ni pensu pri ŝi. Por ni ŝi estas unu el la plej fascinaj artistoj, kiuj kiam ajn ekzistis. La historio estas justa al ŝi, kiam ŝi ankoraŭ vivis, ŝi estis pli-malpli nur la edzino de la granda Diego Rivera, sed nun Diego Rivera estas unuavice la edzo de la granda Frida Kahlo. Se ne tiel estus, oni verŝajne jam estus preskaŭ forgesinta lin kiel aliajn pentristojn en Meksiko.

Frida famas kiel pentristino, sed oni devus aldoni, ke ŝi donas ekzemplon por tio, kion ĉion homo povas atingi, se ŝi aŭ li nur volas. Spite al ĉiuj malhelpoj en sia vivo, ŝi estis forta kiel jaguaro kaj samtempe delikatsenta kiel packolombo. En la kaptilon de malhumana seka ideologio ŝi falis neniam, male, ŝi endubigis tiajn per sia arto. Kiam la komunistoj estis ankoraŭ profunde virviraj, ŝi jam elsendis signalojn pri la homaj rajtoj de inoj.

Estas tre malfacile ne ŝategi, ja ne ami tiun simpatian inon kun la bela sekretoplana vizaĝo, kiu kiel ino portis sian koron ĉiam videble surmane kaj montris ĝin al ni en

ege emociigaj bildoj, en multaj bildoj ŝi montras sin en tre radikalaj memportretoj, parte kontraŭ ĉia tradicio. Eĉ la stilcerta genia Pikaso diris iam: "Neniu pentris pli bonajn memportretojn ol Frida." La mesaĝoj de tiuj portretoj estas fortaj, ili montras ŝiajn suferojn, sed ankaŭ la nekredeble fieran karakteron de Frida, kiu eĉ vundita kiel ĉasbesto, neniam humiligis sin antaŭ io aŭ iuj. Por inoj Frida estas tial tiom grava, ĉar ŝi donas impresan ekzemplon pri tio kiel ino batalu en viromondo. Ŝia famo pli kaj pli kreskas, certe ne unuavice tial, ĉar ŝi estis engaĝita komunisto. Sed oni ne miskomprenu nin, ni ne estas kontraŭ komunistoj, tute ne, eĉ male, ni estas nur kontraŭ stultaj tielnomataj komunistoj, kiuj bezonas gulagon por certigi al si, ke ili havas potencon, pseŭdokomunistoj, kiuj komprenas nek arton nek virinojn kaj kiuj kondukis la socialismon pro krueleco kaj stulteco en homaran katastrofon. La komunismo de Frida baziĝas sur io tute alia, sur la rajto je fiera unikeco kaj je la konvinko, ke ĉiu homo por la homaro estis grava, ĉu ina ĉu vira, ĉu sana ĉu malsana. Frida ne pentris sin tiom ofte pro vanteco, sed por certigi al si sian personecon. Ŝi ne volis esti nur la edzino de la fama Diego Rivera, kiom ajn

ŝi amis kaj akceptis tiun "dikan ranon". Frida estis avangardistino de l' pentroarto kaj pli ol tio, ŝi estis grandioza unika homo, kiun admiras nun jam multaj homoj el la tuta mondo.

(verkis Dorothea & Hans-Georg Kaiser)

Kion vi pensas pri Esperanto kaj ties estonteco?

Ke homoj estas misfidemaj al kio ajn, estas la sekvo de tio, ke la mondo estas plena de trompisto de ĉia speco. Tio estas certe kaŭzo de tio, ke ili ne lernas Esperanton, sed ili ankaŭ tro fidas aŭtoritatojn pri la ŝtato kaj pri la gazetaro kaj la aŭtoritataj gepatroj. La plimulto de la homoj sankte fidas pri tio, ke la murdobrologistoj estas ĉiam sur la alia flanko de la muro, ili sankte fidas pri tio, kio estas skribita en la gazetoj aŭ kion diras partiestro aŭ episkopo aŭ kiu ajn, kiu havas iun potencon; ili ne mem volas aŭ povas pensi kaj agi, ofte pro aĉaj cirkonstancoj, domaĝe, ĉar ĝuste tio ofte malhelpas, ke ili komencas lerni Esperanton.

Kaj la politikistoj mem tute ne interesiĝas pri Esperanto, ĉar la esperantistoj transpaŝas naciajn limojn, kaj tion eĉ sen demandi siajn politikistojn, ĉu ili rajtas fari tion. Tio estas kompreneble suspekta por registaroj, kiuj pensas nacie kaj ne internacie.

Mi supozas tion: Esperanto estas tro moderna por tiu ĉi mondo; nacioj kaj ŝtatoj, kiuj per armeoj minacas aliajn, por ke oni timu ilin, ne havas intereson pri amikeco inter diversaj popoloj. Tiujn „tielnomatajn amikecojn“ ili flegas ja mem, ĉe festbankedoj kaj paroloj, kiuj ofte plorgutas pro tiom da pacamo. Kaj intertempe ili konstruas novajn armilojn kaj vendas ilin en iujn regionojn de la mondo, por ke la homoj tie reciproke mortbatu sin. Tiel, ke ili estu la ridantaj triaj, la profitantoj de homaj mizeroj. Tiom longe, kiom registaroj tiel agas, ni ne povas esperi pri subtenanta agnosko de Esperanto, sed nur pri la malo.

Se la registaroj iam estos efektive pli pacemaj tutmonde, Esperanto tuj estos lernataj de multaj homoj, do, mi estas tute optimisma pri la futuro de Esperanto; kial tio ne iam okazu, se ni vere volas tion kaj laboras por tio? Kaj se la homaro ne antaŭe sin mem neniigas. Sed necesas por tio nepre mondo sen kapitalismo, pacordo en multaj landoj. Tion sciis kaj deziris jam L.L. Zamenhof, kaj tial ni devas esti pacbatalantoj, se ni volas, ke Esperanto havu brilan futuron. Esperanto decide povas prosperi kaj ekflori nur

en paca socia ordo tutmonde. Aliokaze ĝi plu estos plej ofte nur ludilo por kelkaj malmultaj ekstravagantuloj, kiuj havas tro da libera tempo, kies breĉon ili devas ŝtopi iel per vanta sencela agado.

PS: "Kion vi opinas pri Esperanto? Pri ĝia estonteco?" Tiujn demandojn metis amikino de Maksim Griŝin en lia ipernitia blogo. Mi respondis ĝin per la supra eseo. (cez)

La feliĉo

La feliĉo estas la ŝlosilo por nia bonfarto, tion sciis jam Epikuro, sed kie ĝi troviĝas? Ja kie kaj kiam ĝi perdiĝis? Neniu scias tion tiel precize. Sed ĉiuj ĉasas fervore la feliĉon kvazaŭ ĝi estus ĉasbesto.

En aldono de la gazeto "Die Zeit" gazetolegantoj ĉiukajere skribas pri tio, kio estas feliĉo por ili. Kaj interese, ĉiu havas alian respondon... Ĉu eble tio estas la fonto de vera feliĉo, la individueco de la feliĉo? Kiel esti feliĉa sen individueco, ĉu?

Ret Marut en la gazeto „Brikofaristo“ skribis: „La amaso necesigas unuecon. Sed neniam homoj estis unuecaj, neniam homoj unuecos.

Kun via tuta saĝo, kun ĉiuj viaj teknikaj artifaĵoj vi ne kapablas samtempigi eĉ du horloĝojn. La homoj ne estas horloĝoj. Sed vi volas egalpaŝigi ilin.

Ho, blindigitoj! Ĉu vi povas produkti cerbojn per maŝino kaj enplantigi ilin en homojn?

Sed vi volas havi la amason, vi volas la unuecon de la amaso. Kiun pluan pruvon vi bezonas, ke vi estas gvidatoj, miskondukattoj?“

Jes, certe, li pravos, ĉiu folio de ĉiu arbo sur la mondo estas diversa, kial ne la feliĉo de la homoj? Kial homoj ĉiam bezonas uniformon por ĉio? Ekzemple feliĉmodelon? Ĉu mi povas esti feliĉa nur kiel amashomo laŭ iu ununura feliĉiga modelo?

Kaj tamen ankaŭ Johano R. Becher, la germana poeto certe pravos: "Kiel mi povas esti feliĉa, se homoj ĉirkaŭ mi ankoraŭ estas malfeliĉaj?" Tre interesa respondo pri tio troviĝas en la Komunista Manifesto:

„An die Stelle der alten bürgerlichen Gesellschaft mit ihren Klassen und Klassengegensätzen tritt eine Assoziation, worin die freie Entwicklung eines jeden die Bedingung für freie Entwicklung aller ist.“

„Anstataŭ la malnova burĝa socio kun siaj klasoj kaj klaskontraŭoj ekestas asocio, en kiu la libera evoluo de ĉiu estas la kondiĉo por la libera evoluo de ĉiuj.“

Kial mi tradukis „ekestas“ kaj ne „ekestos“? Ĉar por Marks la komunismo ne estas celo kaj futurmuziko, sed movado:

„La komunismo por ni ne estas stato, kiu estigendas, ne idealo, al kiu la realeco adaptiĝu. Ni nomas komunismon la efektivan movadon, kiu la nunan staton ĉesigas. La kondiĉoj de tiu movado rezultiĝas el la nun ekzistanta antaŭkondiĉo.“

Karlo Marks (1818-1883): La Germana Ideologio (1845).
MEW 3/35

Nu, tio eble surprizas kelkajn legantojn, ke eĉ laŭ la Komunista Manifesto feliĉo estas ligita al la libera evoluo de ĉiu unuopulo. La feliĉo ne estas ĉasebla kiel ĉasbesto, ĝi estas trovebla nur tie, kie individuo povas libere evolui. Kelkaj homoj jam nun havas tiun privilegion, sed multaj aliaj devas ankoraŭ batali pri tiu kondiĉo. Por povi libere evolui oni bezonas multe da libera tempo, do plia kondiĉo por la feliĉo estas certe mallonga labortempo de individuo aŭ almenaŭ labortempo, kiu estas nur plu fonto de plezuro, do jam ne sklavlabortempo, kaj tio validas eĉ

en tute diĝigita mondo laŭ ideoj de Silicon Valley. (cez)

La fendo de l' mondo

La fendo de l' mondo pli kaj pli klare montriĝas, ĝi estas la vera kaŭzo de ĉiuj fuĝoj kaj elmigroj. Ke riĉo estas ne nur riĉo, sed ankaŭ brutala vivmaniero, tio montriĝas krome ĉiutage ĉe tiu temo. Min la adorado de riĉo ĉagrenas jam de multaj jaroj, efektive ĝi estas nur primitiva fi-perspektiva viv-kaj ekspluatmaniero, kiu malhelpas la homaran evoluon, kiu detruas la planedon Tero. Kiom da mono kaj kiom da energio oni disipas, nur por vivteni la riĉon en la mondo?! En ĉiu kazo tro, la kalkulojn pagas kaj pagos la homaro...

Anstataŭ defendi la riĉulojn, ni fine devus defendi la malriĉulojn kontraŭ la riĉuloj, tio estus pli prudenta ol limaj pikdratoj kaj muroj inter la popoloj... Por mi ĉiu milito, kiu detruas ekonomiajn resursojn, estas krimo kontraŭ la homaro, subfosado de la homaj rajtoj.

Ĉu iu ankoraŭ memoras, ke laŭ la homaj rajtoj ĉiu rajtu libere moviĝi, ke ĉiu homo rajtu libere elekti sian loĝlokon? La homaj rajtoj estas truigitaj kiel la celtabuloj en pafbudoj sur foirplacoj: tio estas nia ĉefa problemo, ke

oni ne defendas la homajn rajtojn, sed ties neniigantojn.
La fuĝantoj estas minacataj, ne la persekutantoj. (cez)

La revoluciulo Jesuo Kristo

Ankaŭ pri Jesuo ne certas, ĉu li ne tamen estas nur bona eltrovaĵo. Pruvo por lia historia ekzisto ne estas trovita ĝis nun. Sed la Kristo de la evangelioj estis revoluciulo – speciale tiu de la Lukas-evangelio – kiu predikis al sia revolucia grupo el apostoloj la komunismon, kiel oni povas legi pli detale en la leteroj de Paŭlo, kun la evidenta neeldirita intenco detruiri la potencon romian regnon.

Jesuo estis homo sen iu posedo, kiu havis ĉion ĉe si, kion viro bezonas, kiu decidis, ke li volas ŝanĝi la mondon en pacan lokon por ĉiuj. Li estis posteulo de la ĉina filozofo Laotse, kiu instruis jam jarcentojn antaŭ li, ke la softa akvo detruas la plej duran ŝtonon. Tia koncepto estas ankoraŭ nun moderna, sed en alia senco ol la eklezioj kaj la adorantoj de hierarkiaj sistemoj imagas tion.

Konsekvenca pacifisto tamen ankaŭ li ne ĉiam estis, ĉar li male al sia pacifista montprediko diris en iu evangelio, ke li ne venis por alporti la pacon, sed la glavon. (Tre verŝajne tio estas falsiĝo de la originala teksto.) La germana gvidanto de la ribelantaj kamparanoj en la Kamparanaj militoj, la anarkiema Thomas Müntzer,

tamen uzis ĝuste tiun frazon por legitimi sian batalon kontraŭ la princoj per armiloj.

Eble mia vidpunkto pri Jesuo iom surprizas kelkajn el vi, al tiuj mi rekomendas legi la poemojn kaj prozaĵojn de la nikaragvano Ernesto Cardenal, kiu estas bonega revoluciema interpretisto de Jesuo.

Krome mi devas mencii, ke Jesuo el Galileo laŭ Biblio estis metiisto, antaŭ ol li fariĝis revolucia profeto. Tion oni volonte forgesas. Jesuo estis ne nur profeto, sed ankaŭ praktika viro, viro el la popolo. Kiam B. Traven en la Mortula Ŝipo nomis sian mariston 'Gale', li tute certe pensis ankaŭ pri tiu ĉarpentisto el Galileo, la viro kiu poste iam ĵetis la monŝanĝistojn el la templo, la softa furiozulo eble estis eĉ zeloto. En ĉiu kazo li estas ĝis nun dorno en la okuloj de ĉiuj militistoj kaj kapitalistoj, kiuj faras gigantajn profitojn helpe de militoj kaj per ekspluato de malriĉuloj. Jam la kruckavalieroj murdis por la profito. Kiom da homoj devis jam morti pro ĝi? Tio apenaŭ plu kalkuleblas. Ĉiam denove troviĝas iuj frenezuloj, kiuj sankte fidas pri tio, ke oni povu krei ion bonan per detruado aŭ subigo.

Tute absurda afero estas, ke ankoraŭ nun troviĝas sufiĉe da senskrupulaj eklezianoj en diversaj landoj, kiuj benas la militistojn, kvazaŭ Dio estus naciisto, aŭ kvazaŭ Dio tie starus, kie estas la pli bonaj kanonoj. La ne-filo de Dio, kies granda signifo bazas sin sur tio, ke li estis homo (kaj ne Dio!), malamegis ĉiun militon kaj avertis, ke tiu, kiu prenas la glavon, mortos per la glavo. Kiom ofte tio nun jam okazis? Kiom ofte tio ankoraŭ plu okazos?? Kiom da homoj devos ankoraŭ morti pro iuj teroristoj, ĉu ŝtataj ĉu neŝtataj, ĝis oni ekkomprenos la eraron, ĝis oni metos la armilojn tien, kien ili apartenas - do en muzeon?! La respondon scias eble eĉ ne la vento.

Nia matrjoŝko kaj la rusa-germana amikeco

Nia matrjoŝko estis tute surpriza donaco de rusaj oficiroj post nokta kuna banado en lago, ĝi estis fakte la adiaŭa donaco de rusoj, kiuj devis forlasi GDR-on pro politikaj kaŭzoj. Min tio tiam kore tuŝis, kaj ĝi tuŝas min ankoraŭ nun, kaj pro tio mi tre bedaŭras, ke la oficiala Germanio transiris al la kutimo, rigardi la rusojn kiel eksplacitajn malamikojn. Sed ne ekzistas bonaj germanoj kaj malbonaj rusoj, ekzistas nur aĉaj politikaj sistemoj kaj ŝtatoj, kiu faras el anoj de iuj nacioj bestaĉojn, la homoj ne estas bestaĉoj, sed la fiaj registaroj, kiuj traktas homojn kiel ŝakfigurojn, kaj kiuj ne lasas aliajn alternativojn al homoj.

Nia Matrjoŝko estas ne nur tre bela, kun pliaj same belaj laŭ la cepoprincipo en si mem, sed ĝi ankaŭ ĉiam avertas min, ke mi ne lasu tiri min en iun patrian orgojlon; homoj ne estas sistemoj, ĉie ekzistas tiaj kaj tiaj homoj, la rusoj, kun kiuj Donjo kaj mi banis nokte en lago, estis gaje kamaradecaj, ili ne rigardis nin kiel aĉajn perfidemajn orientgermanojn, sed kiel homojn afablajn, kaj ili eĉ ne dum sekundo traktis nin kiel malamikojn, ĉar ili devis

forlasi la agrablan "laborlokon" GDR.

En Germanio oni nun volonte forgesas, ke estis la rusoj, kiuj liberigis nin de la faŝismo, kaj ankaŭ inter la liberigantoj estis kompreneble tiaj kaj tiaj homoj, kruduloj kaj grandanimuloj. La amikeco al la rusoj en GDR neniam ĝenis min, ĝi estis bona afero, kiom ajn mensogeca ĝi ofte prezentiĝis sur altaj tribunoj. Mi ĉiam ĝuis rusan arton kaj speciale rusajn filmojn kaj librojn ks. Kaj mi persone esperas, ke la rusoj iam faros diferencon inter Putin kaj la rusoj. La rusoj laŭ mia opinio pro diversaj kaŭzoj liberigu sin de Putin & kunuloj, kaj ili iru pli pacan vojon, se temas pri internacia politiko. La ekstera politiko de Putin estas por mi nur sakstrato, kiu povus izoli Ruslandon.

Cetere, niaj nepoj, la pli juna kaj ankaŭ la malpli juna jam ofte elpakis kaj poste denove kunpakis la matrjoŝkon. Ili rigardas ĝin kiel veran belulinon kaj kiel sian fidelan rusan amikinin. Aĉaj politikaj sistemoj leviĝas kaj falas, sed tiaj geniaĵoj kiel matrjoŝko neniam mortos. Ili estas la eterna pruvo, ke la popoloj estas pli saĝaj kaj pli vastkoraj ol ties regantoj. (cez)

Pieter Brueghel: La triumfo de l' morto

Gravega fonto por la romano "La Mortula Ŝipo" de B. Traven

„La triumfo de l' morto“, la grandiuoza pentraĵo, estas pentrita de homo, kiu estas ankoraŭ nun suspektata pri anabaptisteco, do pri tio, ke li estis radikala kristana komunisto. Por mi ne estas dubo, ke li efektive estis membro de tiu siatempe malpermesita kaj kruele persekutata movado, kiu havis adeptojn en kelkaj landoj de Eŭropo. Kial mi pensas tion? Nu, simple rigardu la pentraĵon kaj vi tuj ekkonos ĉiujn gravajn temojn, kiuj ankoraŭ nun terurigas kaj okupas la homaron: Militoj, plagoj, mortkondamnoj, prostituado, malsato ktp...

„La triumfo de l' morto“, estas la plej akra kritiko al la klasa socio, kiu imageblas... Por mi ĝi estas en tiu rilato la plej bona pentraĵo, kiun mi konas, rilate al ĝi eĉ la pentraĵo „Guernica“ de Pikaso aspektas iom artifika. La influo de la anabaptistoj estis granda, ĝi etendiĝis ĝis Jan Hus aŭ ĝis la kamparana gvidanto Tomaso Müntzer. Kaj ĝi influas anarkiistojn kaj radikalajn kristanojn ankoraŭ

nun. Kiel Jesuo, tiel ankaŭ la anabaptistoj prudente taktike sendis siajn heroldojn tra tuta Eŭropo; la pentraĵo „Landluper“ (Kuranto tra landoj) de alia fama pentristo, de Hieronimo Boŝ, montras tian propagandiston. Kia impresa bildo, kaj kia vizaĝo, jen homo, kiu tute ne estis primitiva murdvida fanatikulo – do tute ne tiel, kiel oni povas legi tion bedaŭrinde ĝis nun en servilaj historiaj libroj, kiuj volas flati al sia reganta klaso – tiu heroldo estis homafablulo, en lia vizaĝo respugliĝas indo, melankolio kaj saĝo. Jen homo, kiu ne havas problemon kun si mem, sen plendoj li eltenas eĉ sian povrecon, ĉar li scias por kio li vivas: por laŭkrista komunismo, en kiu mono kaj regantoj de homoj ne plu ekzistos, sed anstataŭ tio multe da amo inter la homoj. Jen tio, kion homoj vere bezonas.

Se vi rigardas en la mezon de la pentraĵo „Triumfo de l' morto“, vi ekkonas tre strangan kestecan nigran ŝipon kun krucetoj sur la balustradoj, sur kiu ekestis fajro, nu, tio estas la praformo de „Jorike“ de la Mortula Ŝipo de Traven. Ke tiel estas, ne plu pridubblas, se oni zorgeme rigardas la pentraĵon: ĉiuj gravaj temoj de la Mortula

Ŝipo reaperas tie antaŭ la okuloj. Oni povas havi la impreson, ke Traven havis la pentraĵon antaŭ si, kiam li verkis la libron, eble ĝi estas eĉ la kodo por „La Mortula Ŝipo“, ĉar ĝisdetale ekkoneblas okazaĵoj el tiu libro sur tiu pentraĵo, ja kelkaj strangaj mencioj de Traven el la libro ekkompreneblas nur per tiu ĉi verko. La pentraĵo kompareblas al noda reto, kiu „kuntenas“ la enhavon de la libro. Ke Traven tre detale studis la historion de la kristanaj herezuloj, ankaŭ helpe de artverkoj, estas konata fakto, do ekster ĉiu dubo.

Cetere, en la mezo de la pentraĵo estas rivereto, kiu laŭ diversaj esploristoj estas la „Trave“ en la nordo de Germanio, kiun jam Andersen priskribas en vojaĝlibro sufiĉe mistere kiel la riveron de la vivo. Ĉu tio estas stranga koincido? Certe ne, la pentraĵo evidente havis por Traven eksterordinaran signifon. Eble tio ĉio havas ankaŭ framasonan fonon. La Mortula Ŝipo kun elstrekita suno aperas jam en desegnaĵo de Seiwert en la „Sep vizaĝoj de l' tempo“ en la gazeto „Brikofaristo“ de Ret Marut, kiu nomiĝis pli poste B.Traven.

Se vi, kara leganto, legas la libron, bonvolu kompari ĝin ankaŭ al la pentraĵo, kaj vi miros pri tio, kiom da paraleloj havas la libro kaj la pentraĵo. Por mi tio ne estas hazardo, ĉar la revoluciulo Traven studis siajn antaŭulojn kun granda sindediĉo kaj fervoro, kio klarigas ankaŭ, kial li estis tia brila bibliofirma religikritikanto. Ankaŭ mi studis certan tempon la historion de la herezuloj por trovi ligojn al B.Traven, kaj mi trovis multajn.

Traven, male al multaj aliaj revoluciuloj tre klare konsciis pri tio, ke ni ĉiuj staras en vico de homoj, kiuj jam longe antaŭ ni batalis por justeco, belo kaj amo en la mondo. Kaj li sciis tre bone, ke li ne estos la lasta en tiu vico.

Ke oni legos lin ĝuste pro lia humaneco kaj homafabla sinteno de aŭtentika revoluciulo, li sciis jam kiel Ret Marut en Munkeno: „Mia tempo venos, tio ne estas mia kredo, sed mia certo.“

Kaj por tio, ke „lia tempo“, do tiu de la anarkia komunismo (Traven mem tamen ĉiam evitis tiajn politikajn etikedojn), efektive iam ekestu, ankaŭ mi vivas. Tio estas mia persona politika konvinko, la senco de mia

vivo. Mi ne travivos tiun tempon, sed pri tio ne temas, tamen mi volas esti almenaŭ unu el la antaŭirantoj kaj voĵpretigantoj, UNUEL kiel Zamenhof, aktiva revulo kiel John Lennon, do tiel, kiel B.Traven esti homo, kiu kapablas pensi trans la propran telerrandon, unu el tiuj, kiuj ankoraŭ simbole leviĝos je certa tago iam el siaj tomboj, tiam, kiam la kapitalismo tutmonde estos malaperinta kaj kiam komenciĝos la tempo de la aŭtentikaj konsiliaj komunumoj, floropovomondo sen drogaĉoj, utopia Nirvano, kie lakto kaj mielo fluos, kiam anarkiistoj kaj komunistoj ne plu kraĉos reciproke vizaĝen, kiam ili ne plu estos Kajn kaj Abel, tiam, kiam la Triumfo de l' Morto definitive estos finita. (cez)

PS

Bonvolu legi plu ĉi tie: La Mortula Ŝipo (PDF)

<http://www.karapaco.de/u/B.Traven>

Pri kosmopolitismo

Por mi ĝi ne estas eraro, se oni estas pli kosmopolitisma ol patriota. La kosmopolitismo, mondocivitaneco, cetere eltrovaĵo de Diogeno, de la viro en la barelo, estas jam tre malnova tradicio. Sed kio estas kosmopolitisma sinteno nun? Mi pensas, ke ĝi estas la ekkono, ke ni unuavice devas gardi nian planedon Tero, por ke ni povu vivi plu pace en tiu lando kaj inter tiu nacio, en kiu ni hazarde estas naskitaj, ĉu ne? Iam ankaŭ nacioj perdiĝos. Sed tio estas ankoraŭ futura muziko. Multaj esperantistoj emas al tio esti pli sennaciismaj ol naciemaj, pro bona kaŭzo.

Nia planedo Tero estas nia domo, kaj nia loĝejo en tiu domo estas kutime la nacio ĉambro, en kiu ni vivas pli malpli hazarde. Se oni rigardas Teron el la kosmo ĝi estas nur unu planedo, kiun oni vidas, ne tiu aŭ tiu detalo de ĝi, kvankam ne povus manki eĉ nur peceto de ĝi, ĉar alie ne temus plu pri nia blua planedo Tero, sed eble jam pri detruita globo, kiu estis iam nia amata Tero. Tute certe ankaŭ nia galaksio iam mortos, sed ĝis tiam ni, la homaro, havos ankoraŭ la eblon vivi kaj ne morti pro stulteco, pro malamo, pro militoj, pro fia socia ordo aŭ

memfaritaj naturkatastrofoj.

Spiralo de perforto

Spiralo estas kurbiĝo, kies radiuso fariĝas pli kaj pli granda kaj dum tio ĉiam ŝanĝas la flankon. Se okazas perforta ago, la kontraŭflanko ĉiam reagis per pli granda perforta ago, por tiel iam venki; tio estas la tielnomata spiralo de perforto, ĉar la idioteca konduto similas al matematika kurbiĝo.

Sed tial, ĉar ĉe pli kaj pli granda spiralo de perforto la pacigaj diplomataj ebloj fariĝos pli kaj pli malgrandaj, finiĝos la perfortospiralo kutime nur tiukaze, se ambaŭ malamikaj partioj estas ĝis la lasta ŝtat- aŭ nacia aŭ familia membro neniigitaj kaj ĉiuj kuŝos en tombejo.

Jesuo, la homo, ne la falsa Dio! (eble la homo Jesuo ja tamen vere vivis), kaj ankaŭ Budhao esploris tiajn perfortajn agadojn, ili proponis interrompi la perfortospiralon per tio, ke oni pardonu al la malamiko ties kulpon kaj agu pace. Sed ĝuste nun oni kutime rigardas tiujn proponojn kiel naivaj kaj tro revemaj; tial havas ĉiuj grandaj nacioj nutrantaj la perfortospiralon, havas armeon kaj armilindustrion, kiuj voras gigantajn

monsumojn ĉiujare. Tion oni rigardas kiel saĝa aŭ eĉ ruza ĉi-tempe. Kaj tielnomataj teroristoj, ankaŭ ŝtataj, pensas kaj agas tute same. Ili estas ĝemeloj de la sama superstiĉo.

Ke povus ekzisti ankaŭ paca vojo por ĉiuj, tio ne serioze estas rigardata kiel alternativo de grandaj ŝtatoj. Alikaze ili ja ne produktus armilojn kaj ne uzus ilin. (Ke Germano ĉijare, do en la ajro 2016, permesas la vendadon de dekfoje pli da municio eksterlanden ol jaron antaŭe, estas tute nekomprenebla kaj klarigebla nur per la vortkombino: profitavido. La teroristoj de ĉiu speco, kiuj aĉetas la municion kaj armilojn, pensas kaj agas tute same. Ili profitavidas je sia maniero.

La kompatindaj viktimoj estas ĉiam tiuj, kiuj tute ne kulpas la perfortospiralon. Ili ĉiam pagas, ofte eĉ per sia sango, kion kaŭzas la perfortistoj.

Tial estas ni, la amashomoj, en ĉiama dilemo, nin oni ne demandas kiel agi, aŭ nur tiukaze, se oni antaŭe sufiĉe sukcese manipulis nian pensadon. Tial tondras preskaŭ ĉie seninterrompe la laŭtparoliloj por perforta agado,ĉar

la pacagado laŭdire estas afero por naivuloj kaj la milito – kvankam ĉiam malsukcesa kaj vana por la homaro – la laŭdira solvo por ĉio, tio kvankam perforto evidente neniam ion kreas, sed nur ĉion detruas. Jen la superstiĉo, kiun mi notis en la poemo „Superstiĉo perforto“ por mia propra memkompreno. Ĉu oni iam komprenos tion kaj tutmonde agos sen perforto? Ĉu oni iam ne plu gloros la detruigan perforton, sed la kreivan pacagadon tutmonde? La respondon scias laŭ Dylan nur la vento. *The answer is blowing in the wind.*

Spiraloj per sim mem estas estetike belaj, kaj tamen eĉ tiaj geniaj eltrovaĵoj de la naturo en nia freneza mondo nun antaŭ ĉio priskribas ion, kio tute ne estas estike bela, sed kruela, brutala, kaj memdetrua. Sed homoj kutime ne lernas ion el spertoj, alikaze ili jam delonge estus forlasintaj eterne surloke turniĝantajn perfortospiralojn kaj celus pli pacan agadon en pli komuneca mondosocio. (cez)

PS:

Jen la menciita poemo:

Cezar

Superstiĉo perforto

Mi ofendas vin,
vi ofendas min,
tiel ĉio trovos sin.

Vin minacas mi,
min minacas vi,
jen perfekta harmoni'!

Vi pafos min,
mi pafos vin,
tiel trovu solvo sin.

REDAKTOFINO

28.11.2016

La tekstoj ankoraŭ tute ne estas kompletaj. La aldonado de pliaj tekstoj okazos ĉiusemajne. (cez)